

Prezo: 7 €

www.satesperanto.org

Septembro-Oktobro 2017 | n-ro 09-10 (1347-1348)



Sennaciulo

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Antaŭ unu jarcento en Balkanio blovis militaj ventoj...



...kaj ĉijare kongresaj ventoj

SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

Kanzono de Brigitte Fontaine (2009)

Ĉar mi vidis, ke S-ulo interesiĝas ne nur pri klasbatalaj temoj, sed ankaŭ pri la problemoj de individuaj liberecoj en la socio, mi pensas, ke eble konvenos la publikigo de tiu tradukaĵo, aktualeca kanzono de Brigitte Fontaine:

Malpermeso

Trajnkarton maljunulan mi
Montregis al la porka ul'
Kun lia obscena ekridet'
Al mia sirena siluet'.

Rekantaĵo:

Mi maljunas, kaj bugras vin,
Kun de libelo la aspekt'
Kun maljun', jes mortontas mi,
Forgesita jam detalet'

Bastardoj for de mia vid'!
Al trinkvagono iru tuj!
La cigaredon ekfumos mi
Kun kvieto en necesej'.

Ĉie regas malpermeso,
Alkohol' en televido,
Legitimaĵoj, monmanko,
Maljuni en publiklokoj.

Ĉie regas malpermeso
Parol', skribo, seksumado,
Ne da ĉuro sesdekuloj!
Alie skandal' kaj ridaĉoj.

al la Rekantaĵo

Malsanuloj prohibitas,
Enfosaĵen forĵetiĝas,
Krom se enspezigas monon,
Financadas la riĉulojn.

La maljunuloj rubujen!
Al kadukej', forgesejen.
Jen kio ja atendas min,
Se iam mi perdos vojon

Planojn aliajn havas mi
Planas fiki, drinki, fumi,
Ĉielojn elpensi novajn
Pli ampleksajn kaj pli ravajn.

Mi maljunas kaj bugras vin,
Kun de libelo la aspekt'
Kun maljun' kaj sen leg' ulin'
Se mortos mi, 'stos pro la ĝu'.

Esperantigis R. Platteau

Novembro 2013

EL LA SAT-ADMINISTREJO

Plia kandidato por la PK.

Guy Cavalier (31976):

SAT-ano ekde 1972, membro de la PK ekde 1981, partoprenis en la organizado de SAT-amikaraj kaj SAT-kongresoj, pacisto kaj prizorganto de ĉiusemajna Pariza Esperanto-elsendo.



Karaj legantoj,

Jen, kun bedaŭrinde rekorda malfruo, la septembro-oktobra numero de Sennaciulo. Kun ĝi estas ekspedita la referendumilo, grava ilo por ebligi al vi decidi, kiuj plenumos la ĉefajn administrajn taskojn dum la venontaj tri jaroj, kaj kiu kontrolos kaj konsilos tiujn plenumantojn. Tamen ne nur per balotilo eblas influi la asocian vivon. Ankaŭ via ĉiuforma partopreno gravas por ebligi glatan asocian funkciadon. Frua kotizpago ŝparigas tempon al perantoj kaj ĉiuj, kiuj helpas kolekti la monon bezonatan por la komunaj aktivaĵoj. Nutrado de Sennaciulo, ankaŭ pere de mallongaj informoj pri via loka agado, gravas por informi pri la asocia vivo en diversaj mondopartoj. Kaj ĉefe, nun vere necesas freŝaj fortoj por pliefikigi la redaktan kunordigadon. Unua simpla paŝo, por prepariĝi al iama transpreno de tiu ĉi tasko, povas esti partopreno en la redaktoskipo kiel korektanto. Por tio ne necesas havi lingvonivelon de akademiano. Ĉiu povas kun iom da atentemo korekti simplajn tajperarojn, aŭ serĉi bildon por ŝtopi blankan spacon en iu paĝo.

Se ni vere ĉiuj deziras krei pli egalecan mondon, la unua paŝo certe estas pli vaste dispartigi la farendajn taskojn inter ni. Pensu pri tio, antaŭ la nunaj aktivuloj plene elĉerpiĝos.

La redaktoskipo

Venontaj limdatoj

Sennaciulo 1-2/2018 (1349-1350) : 28a de februaro

Sennaciulo 3-4/2018 (1351-1352) : 31a de marto

Enhavo

TRA LA MONDO - KURDIO

- 4 "Oni min arestis kiel avertito por la fremdaj vizitantoj"
- 5 Ni iros kune al la batal'... EDUARDE ELDAROV

TRA LA MONDO - ORIENT-EŬROPO

- 6 Koncize
- 6 Eŭropaj judoj mallaŭdis Latvion GRIGORIJ ANTONOV
- 7 Pollando rezistas PASCAL DUBOURG GLATIGNY
- 9 Oni diras ke islamanoj minacas Okcidentajn Moralajn, sed kio estas Okcidentaj moralaj? ROBERT NIELSEN
- 11 Korano VIVIANE TITS
- 11 Filipinanoj protestas kontraŭ ASEAN, Trump ALBERT STALIN GARRIDO

TRA LA MONDO - ORIENTA AZIO

- 12 Originala projekto en Grekio: Ĥora

EL LA SAT-ADMINISTREJO

- 13 Financa bilanco de SAT-Kongreso en Seulo

SINDIKATISMO TUTMONDA

- 14 Belorusio: Ĉesigu la atakojn kontraŭ la sindikataj gvidantoj
- 14 Kartvelio: Ĉesigu la kontraŭ-sindikatajn persekutojn en la entrepreno Rustavi Azot
- 14 Minimume malgranda laborsalajro SERGEJ VLADIMIROV
- 15 Tamen, Noruzo
- 17 La noruzo de 2017 en Kurdio

EKOLOGIO KAJ MEDIPROTEKTADO

- 18 50 jarojn post la unua nuklea eksperimento fare de Francio en Polinezio HORI JASUO

BELETRO

- 2 Kanzono de Brigitte Fontaine (2009) R. PLATTEAU
- 20 Romano Tur-strato 4 en germana traduko UWE STECHER
- 21 Monaj ĉifonoj (5) ESPOPORE

EL LA LEA-OJ

- 23 Eĥo ekster Esperantujo de la apero en Hispanio de esperantlingva verko MIGUEL FERNANDEZ

LIBERECANA FRAKCIO

- 24 Anarki-sindikatisoj esprimiĝas pri la situacio en Katalunio
- 25 Komento de la Liberecana Frakcio de SAT LIBERECANA FRAKCIO

EL LA SAT-ADMINISTREJO

- 25 Novaj aliĝoj
- 28 Perantoj, Kotizoj, Donacintoj
- 31 Kandidatoj por la Ĝenerala konsilantaro de SAT
- 2 Plia kandidato por la Plenumkomitato de SAT

EL LA LETERKESTO

- 26 Re-ree pri referendumo PEDRO SANZ
- 26 Rerereage KANI

NEKROLOGO

- 27 Yamasaki Seikō, Paul Signoret, Marjorie Boulton

91A SAT-KONGRESO

- 29 Turisma programo de la 91-a SAT-kongreso en Kragujevac

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:
sennaciulo.redaktejo@gmail.com

“Oni min arestis kiel averto por la fremdaj vizitantoj”

Intervjuo de Mikel Rodriguez al Eduardo Izarzugaza, brigadisto, originale aperinta en la eŭska ĵurnalo Berria la 29-an de Marto 2017-a.

Turkio ne volas, ke la vizitantoj informu pri la situacio en Kurdio, laŭ Izarzugaza. Li vojaĝis al Kurdio kun la intenco vidi la konsekvencojn de la konflikto, sed pasintan semajnon oni lin arestis kaj deportis.

Pasintan ĵaŭdon la turka polico arestis en Kurdio la brigadiston Eduardo Izarzugaza (Oĉandio [1], Biskajo, 1970). Oni lin deportis kaj sabate li alvenis en Eŭskio.

Kun kiu celo vojaĝis la brigadistoj al Kurdio?

Ni iris al Amedo [2] por la Noruzo [3] kaj havis programon por la postaj tagoj sed, ĉar la situacio tre malbonis, ni devis improvizi. Ni volis iri al Nisebino [4]. Tiu urbo estis sieĝita kaj nun estas detruita. La intenco estis trovi iun kontakton, vidi la urbon, foti, kaj poste, tie ĉi, verki artikolojn por informi pri la situacio. Sed en Nisebino estis neniu kaj ni decidis iri al Liĝo [5].

La armeo ĵus estis operacinta en Liĝo.

Ni havis amikon tie kaj sciis, ke la

armeo estis plenumanta operacon kun 10 000 soldatoj kaj estis okupinta la urbon. Ni sciis, ke ili mortigis kelkajn civitanojn kaj arestis aliajn kaj volis kompili atestojn. Kiam ni tien iris, la armeo estis retiriĝanta kaj ni vidis ĝin flanke de la ŝoseo kun armiloj kaj mindetektiloj. Sed en Liĝo estis amaso da policistoj. De la unua momento ili postspuris nin, petis niajn pasportojn, demandis, kion ni estis farantaj tie... Ni diris ke ni estis turismantoj, ĉar nia amiko havis domon tie. Ankaŭ la polickomisaro venis por nin pridemandi. Ni ne havis problemojn, sed la tutan tempon ili postgatis nin.

Ĉu vi parolis kun iu?

Ni estis kun homo, bankisto. Li rakontis al ni, kiel li restis enhejme dum dekkvin tagoj sen povi eliri kaj kiel lia nevo mortis pro perdita kuglo de la armeo. Sed ni rimarkis ke, flanke de la polico, ni ne estis bonvenaj kaj ni decidis forlasi la urbon kaj reveni Ameden.

Oni vin arestis dum la reveno.

En la enirejo de Amedo estis

polickontrolo. Oni elirigis nin el la kamioneto kaj nin disigis laŭ la sekso. Oni petis niajn poŝtelefonojn kaj ni klopodis forviŝi la fotojn faritajn dum la Noruzo, sed ne sufiĉis la tempo. Tiam oni komencis diri, ke ni devas iri al la policejo sed, kataluno kiu estis inter ni asertis ke ni rajtis voki nian ambasadejon; ĉar kun ni estis italo kaj kolombiano temis pri tri ambasadoj kaj ili eknervozigis. Tiam, policano ekvokis min turke, min kaptis kaj enirigis en veturilon.

Ĉu oni klarigis pro kiu motivo?

En la policejo ĉiuj parolis turke kaj mi demandis al ili, ĉu mi estas arestita. Ili diris, ke ne, sed ke oni komencos enketon rilate min.

Vi ne estis arestita sed ne povis forlasi la lokon, ĉu?

Poste venis al la policejo amiko mia kaj klarigis, ke mi estas “sub la gardado de la polico”.

Kio distingas tion disde aresto?

Praktike, temas pri aresto. Oni ne povis meti min en ĉelo kaj oni tenis min en seĝo. La venontan tagon alvenis advokatoj kaj rakontis ke la polico estis enketinta kaj ne sciis kion fari pri mi. Tiel oni asertis al mi. Mi demandis al ili, ĉu estas akuzo kontraŭ mi kaj ili respondis, ke oni atribuis al mi “disdonadon de propagando de la PLK [6]”. Oni juĝis min kaj la prokuroro petis absolvon. Sed la polico venis kaj denove min forportis, ĉar la prokuroro ankaŭ postulis deportadon. Ni estis forvojaĝontaj dimanĉe kaj oni informis min, ke ĝis tiam mi devos resti en la policejo. Sed mi diris al miaj geamikoj, ke mi ne volas resti unu tagon kaj duonon pli en la policejo; iuj policistoj montris sin tre atakemaj, ili volis min timigi simulante ke ili batas min; tial, mi pensis, ke fine iu el ili batos min. Do, oni aĉetis mian flugbileton por la posta tago.



Eduardo Izarzugaza

Kian politikan situacion vi trovis?

Oni troviĝas en la kampanjo por la referendumo de la 16a de aprilo. Erdogan volas trudi prezidentisman sistemon por establi totalisman reĝimon. La jeso aŭ la neo estas en la manoj de la kurdoj kaj li strebas disvastigi la teroron por ke ili ne iru baloti. Turkio ne volas, ke oni informiĝu pri tio kaj, kiel avertito por la fremdaj vizitantoj, oni arestis min. Povus esti iu ajn alia.

Notoj (Nomoj en la kurda lingvo krom la indikitaj):

- [1] Otxandio, en la eŭska.
- [2] Amed (Diyarbakir en la turka).
- [3] Newroz. Novjara kurda feriaro.
- [4] Nisêbîn (Nusaybin en la turka).
- [5] Licê.
- [6] Partio de la Laboristoj de Kurdio (PLK)/Partiya Karkerên Kurdistan (PKK).



Ni iros kune al la batal'...

Sindikatoj en Latvio

Sindikatoj decidis unuigi siajn penojn en la batalado por financado de medicino.

En la ministerio de sangardado oni daŭre laboras super la “danĝera” leĝoprojekto pri financado de sangardado. Ministrino de sangardado Anda Ĉakša promesis, ke jam dum tiu ĉi semajno la leĝoprojekto estos interkonsentita kaj komencos sian vojon: komence laŭ strukturoj de la registaro, kaj poste en Sejmo (parlamento). Por ke la oficistoj de medicino komprenu, ke prokrasti la tempon rilate al la leĝoprojekto pri sangardado ne plu eblas, sindikatoj decidis plifortigi sian premadon sur la reganta potenco. Pri komuna batalado por financado de medicino anoncis sindikato de laboruloj de sanprotektado kaj sociala protektado, kaj unuigo de liberaj sindikatoj de Latvio.

Celo de la komuna batalado estas atingi, ke en la leĝoprojekto estu precize enskribita la mekanismo de

plialtigo de la salajro al laboruloj de medicino, kaj ankaŭ fiksita ĉiujara plialtigo de asignadoj (el la ŝtata buĝeto) por la sanprotektado. Sindikatoj postulas, ke ĝis la jaro 2020 la amplekso de la financado (el la ŝtata buĝeto) al la medicino atingu 4% de la landa interna produktado. Indas diri, ke en la plimulto el la landoj de EU jam hodiaŭ por medicino estas elspezataj ĉirkaŭ 7% de la landa interna produktado. Tial nia lando atingos nivelon de Hispanio kaj Portugalio – kiuj tiurilate estas en la mezo de la landoj de EU – proksimume post 10-12 jaroj.

Ne estas neeble, ke laŭ la rezultoj de la pridiskutado, la ministerio de sanprotektado naskos ne 1, sed 2 leĝoprojektojn pri financado de la sanprotektado. Unu dokumento estos dediĉita al certigo de financaj garantioj al la medicinistoj kaj al la suma grandeco de la financado (el la ŝtata buĝeto) al la medicino.

Kaj la dua leĝoprojekto rilatos al la

amplekso de la prezentataj medicinaj komplezoj al la impostpagantoj kaj al tiuj, kiuj ne pagas impostojn. Al la lasta kategorio necesos pagi pro sia kuracado en plena amplekso aŭ fari kotizojn en fonduson de sanprotektado. Tamen, dume ankoraŭ ne estas klare, kia estos la ĉiumonata sumo de tia ĉi kotizo. Tamen, jam estas konate, ke tiuj, kiuj ne pagas impostojn, estos punataj ne tuj, sed post transira periodo, kiu daŭros dum la tuta venonta jaro.

EDUARDE EL DAROV

Gazeto Segodnja, 2017-08-22

Tradukis Andris Natinš

Koncize

La partio *Nia hejmo – Izraelo* prezentis al la parlamento de la lando (Knesset) leĝproponon pri festado de *Tago de venko super naziistoj*: la 9-an de majo je la ŝtata nivelo. Pri tio ĉi informas TASS. Se la leĝpropono estos aprobita, la 9-a de majo estos enigita en la liston de la ŝtataj festoj. Nun en Izraelo vivas ĉirkaŭ 10 000 partoprenintoj de la Dua Mondmilito.

Tradukis Andris Natinš

Eŭropaj judoj mallaŭdis Latvion

Prezidanto de Eŭropa Juda Kongreso (EJK), Vjaĉeslav Moŝe Kantor, faris paroladon kun akra mallaŭdo de latvia registaro, kiu toleris efektivigon – 16-an de marto 2017 en Riga – de defilado fare de legianoj de Vaffen SS.

Defilado de legianoj de Vaffen SS estas malakceptebla, diras ili.

“Paca vivo en Eŭropo kaj edukado de estontaj generacioj maleblas sen malkaŝa mallaŭdo de heroigo de naziismo”, deklaris la prezidanto de EJK. “Indulgemo al nov-naziistoj povas

konduki al ĉena reakcio kaj al lavango-speca altiro al sociale danĝeraj procezoj de ĉiam pli granda kvanto de la loĝantaro de eŭropaj landoj.”

Laŭ opinio de Vjaĉeslav Moŝe Kantor, apero en la 21-a jarcento de novnaziismo povas havi la plej pereigajn sekvojn – ĝis katastrofo. Liberalismo rilate al novnaziismo kapablas multajn eŭropanojn infekti per novnaziaj sentoj.

EJK memorigas, ke nur en teritorio de Latvio, kiu estis okupita fare de faŝistoj dum la Dua Mondmilito, estis murditaj 72 000 homoj de juda

nacieco (80% de la tuta juda komunumo de la lando). Kaj helpantoj de la okupantoj je tio ĉi estis 150 000 soldatoj de latva legio de SS; tiu legio estis kreita laŭ ordono de hitleraj generaloj.

SS, same kiel Gestapo, SD kaj NSDAP, estis agnoskita/konsiderita krima organizaĵo. Tiun ĉi decidon faris Nurenberga Tribunalo. SS kulpas pri krimoj kontraŭ homeco – nome tiu organizaĵo estas kulpigata pro kreo de la koncentrejoj.

Informo

Eŭropa Juda Kongreso (EJK) estis fondita en la jaro 1986 kaj estas la sola reprezenta organo de judaj komunumoj por la tuta Eŭropo. EJK laboras kun registaroj de ŝtatoj, kun institucioj de Eŭropa Unio kaj Konsilio de Eŭropo. Stabejo de EJK situas en Bruselo. EJK unuigas kaj kunordigas laboron de pli ol 40 diversŝtataj judaj komunumoj en Eŭropo, kie vivas pli ol 2 milionoj da judoj. Ekde junio de la jaro 2007 prezidanto de Eŭropa Juda Kongreso estas Vjaĉeslav Moŝe Kantor.

GRIGORIJ ANTONOV

Gazeto Segodnja, 22-03-2017

Tradukis el la rusa Andris Natinš



Vjaĉeslav Moŝe Kantor

Fonto: Acvec, CC BY-SA 3.0, <https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=7541327>

Pollando rezistas

Somero 2017 en Varsovio. En la juda tombejo laŭlonge de malgastema bulvarado, Zamenhof ripozas jam cent jarojn. Meze de forgesitaj tomboj en kvadrato disbatita, lia monumento estas la lasta, kiu fiere staras, plu flegita de anonimaj vizitantoj. Iu ĵus lasis freŝan kronon de vegetaĵoj malhel-verdaj, kiuj interplektiĝas kun delikata fadeno de ilekso elmontranta siajn drupojn el ruĝo de bovsango. La baldaŭ sekiĝonta ornamaĵo por momente kaŝas la centran kvinpintan stelon de la mozaika deklivo. Tuj vidalvide sur la monumenton de Klara, ankaŭ ĝi plu dignoplena, oni deponis tri ruĝajn rozojn, signon de espero kaj ribelo.

For de la tombeja kvieto en la urbo, malgraŭ la somera paŭzo, ĉiujvespere laŭte aŭdiĝas voĉoj de ribelo ĉe la prezidentejo, ĉe la Sejmo, ĉe la tribunalo. La registaro de Beata Szydło anoncis novan reformon, kiu abolas la disecon inter la plenuma povo kaj justica aŭtoritato, bazo de demokratiĝaj respublikoj ekde la 18-a jarcento. Multaj poloj reagis forte al decido, kiu kontraŭstaras la polan konstitucion (art. 45), la traktaton de Eŭropa Unio (art. 2) kaj la Eŭropan Konvencion de Homaj Rajtoj. Pri parlamenta puĉo iuj parolas, ĉar la reganta registaro nomumos la juĝistojn kaj konsekvence malebligos kontraŭstaron al rezulto de venontaj politikaj balotoj. La fantomo de la antaŭ-1989-a diktaturo neeviteble reaperas en la mensoj.

En la balotoj de 2015 la ekstremdekstra partio Juro kaj Justeco (PiS) konkeris vastan plimulton de la sidlokoj en la Sejmo dank'al 38 % el la voĉdonintoj. La maldekstraj partioj dividitaj, kiuj sumis pli ol 11 %, tamen malaperis el la parlamento pro nekapablo unuiĝi kaj prezenti komunajn listojn. En la stratoj de la varsovia somero parlamentaj kaj eksterparlamentaj partioj ne aperas. Ĉiuj demokratoj, ĉiuj generacioj kuniĝas por defendi la rajtojn akiritajn en 1989: neniun liberecon definitive oni posedas, sed ĉiutage oni devas defendi. La maldemokrata transformo de la libera socio entreprenita de la nova registaro ne limiĝas al la politika ebena, sed etendiĝas al kulturo. Ĉar la

socia konsento al ĝia programo estis relative malalta (38 % el la voĉdonintoj egalas ĉirkaŭ nur 19 % el la enlistigitaj voĉdonrajtigitoj), la radikala registaro aktivis sur ĉiuj terenoj kaj ne laste en la kultura sfero cele al evoluo de mentalecoj ("plifortigo" en la registara lingvaĵo). Tiu ideologia agado specife trafas la polan penson kaj arton, kiuj en la lastaj tridek jaroj disvolviĝis en multaj novaj kaj progresemaj direktoj kaj atingis nekontesteblan rekonon sur la internacia scenejo.

En la lastaj monatoj, signoj de kultura reakcia normaligo multiĝis. Inter la unuaj iniciatoj de la nova registaro, fondiĝis speciala fako de la kultura ministerio postĉasanta akademian verkojn, kiuj ne kongruas kun la reganta naciismo. Printempe de 2017, Paweł Machcewicz la direktoro (kaj konceptinto) de la ĵus inaŭgurita muzeo de la Dua Mondmilito en Gdańsk estis maldungita, ĉar ĝi montras la militon en la internacia kunteksto kaj ne sufiĉe enfokusigas "la polan heroismon". Por eksterlandanoj, la maldungo de dek tri direktoroj de la Pola Instituto eksterlande estis forta signo. Plej ŝokis la fulmrapida maldungo de la direktorino de la Pola Instituto en Berlino Katarzyna Wielga-Skolimowska pro motivo, laŭ la ambasedejo, ke "blinda imito de nihilistaj kaj hedonistaj tendencoj portas al neniigo senco por civilizacio". Iuj projektoj de la eksa direktorino ne estis nuligitaj, tamen, verŝajne ĉar ili ne provokas grandan eĥon ĉe la publiko: la omaĝo al Zamenhof aprile de 2017 okazis diskrete (preskaŭ private) en la instituto. Forgesinte rapide la mesaĝon, kiun portis Zamenhof en la Unua mondmilito, la nova teamo de la instituto komferte adaptiĝis al la nova ksenofobia retoriko. Ĉi-somere en Berlino la Pola Instituto ekspozicias polan dezajnon, celante revelacii la "nacion identecon en tiu ĉi tempo de amasa migrado".

Ĉi-somere en Varsovio oni rimarkas diversajn ekspoziciojn, kiuj celebras la novan amikecon kun la najbara Hungario. Neniām oni tiom interesiĝis pri Hungario en Pollando. Sed la politikaj interesoj de la alianco inter la du registaroj, nun en perfekta

ideologia kunsono, naskis ĝin. La du registaroj aktivis en la plifortigo de la Visegrád-premgrupo, en kiu ili klopodas pli stimuli la ĉefan kaj slovakajn registarojn koncentriĝi pri reakciaj politikoj kaj kontraŭ-eŭropa malsolidareco. Konsekvence, la Nacia Etnografia Muzeo montras ekspozicion pri amo kaj ĉefe geedzeco en Hungario, samtempe kiel alian pri Dio en la popola arto. En la Nacia Muzeo oni trarigardas ekspozicion pri hungara fotografio. La historia reviziismo ne konas limojn kaj ĉie enfiltriĝas, guton post guton. En la Muzeo de la Insurekcio establita en 2004 laŭ iniciato de Lech Kaczyński, tiam urbestro de Varsovio, oni aldonis etan ekspozicion pri la aktualaj specialaj fortoj (GROM). Certe la nomo



Karol Radziszewski, *ALI*, 2015, Varsovio, Muzeum Warszawy

de tiu speciala pli malpli sekreta taĉmento fondita en la postkomunisma periodo, kiu operacis en "specialaj kondiĉoj" pasinte en Afganistano, Irako aŭ en kontraŭ-terorista protektado, rekte rilatas al la "silenta nevidata" fako de la poldevenaj trupoj en Anglio dum la Dua Mondmilito. Unuavide oni sin demandas, kial tiu parto de la ekspozicio trovis sian lokon en la insurekcia muzeo kaj ne en la pli ĝenerala muzeo de la pola armeo. Sed poste la truko evidentiĝas: ili estus posteuloj de la valoroj de la rezistantoj dum la Dua Mondmilito, kvazaŭ la lukto kontraŭ la nazioj egalus la nuntempajn batalojn kontraŭ la perfortaj maldemokrataj islamistoj.



**Nick Thurston, *Hate library*, 2017,
Varsovio, Galeria Foksal**

Historia mikspoto nedigestebla.

Ekzemploj de kultura normaligo far la ministeriaj burokratoj abundas, specife en kino, kies efikecon ĉe la amasoj la registaro konsideras pli forta. Tamen ankaŭ en muzea kaj arta kampo, iuj rezistas. Sur la ĉefa placo de la varsovia malnova urbo, la Muzeo de Varsovio remalfermis siajn pordojn al la publiko. Lastan printempon, post kvarjara restrukturado financita de norvega fonduso, la historiaj domoj ĉe Rynek retrovis sian funkcion kiel historian memoron de la urbo. Certe pli ol duono de la salonoj ankoraŭ malplenas kaj iom post iom malfermiĝos al publiko. Tamen la mensa etoso estas jam klare perceptebla. De la Mezepoko ĝis hodiaŭ la Muzeo ilustras la evoluon de la popolo, kiu vivigis la situejon ĉe Vistulo. La allogeco de la urbo, ĝia internacia elradiado ĝis la rusa okupacio de la 19-a jarcento kaj la teruraj suferoj kaj detruoj de la milito kaj de la post-milita periodo. En unu el

la jam enscenigitaj salonoj estis aranĝita galerio de portretoj. Po unu muro por viroj kaj por virinoj. Vizaĝoj de famuloj kaj anonimuloj komponas buntan mozaikon de varsovianoj tra la tempo. Inter tiuj portretoj unu tuj kaptas la atenton. Temas pri freŝdata pentraĵo de Karol Radziszewski (naskiĝis en 1980), kiu prezentas forgesitan figuron de la antaŭmilita Varsovio. August Agbola O'Brown naskiĝis en Niĝerio kaj elmigris al Varsovio en 1922, kie li entreprenis sufiĉe sukcesan karieron kiel ĵazmuzikisto, registris eĉ diskon. En la milita periodo li kunlaboris al distribuado de malpermesita literaturo kaj en somero de 1944 li aktive partoprenis en la varsovia insurekcio: fotoj kaj deklaroj de postvivintoj atestas ĝin. Lia ekzisto estis retrovita de esploristoj en la jaro 2010. Se nur unu afrikano ŝajne partoprenis la insurekcion, oni konas ankaŭ la ĉeeston de varia grupo de eksterlandanoj. Ne nur slovakoj kaj hungaroj (politikaj elmigrintoj), kiel plej ofte raportas la historiografio. Ankaŭ kartveloj, armenoj, rusoj, kvin francoj, unu anglo kaj el aliaj landoj: homoj eskapintaj el la koncentraj aŭ laboraj kampadejoj de la nazioj, eksmilitkaptitoj aŭ simple homoj, kiuj pro diversaj motivoj elmigris al Varsovio antaŭ la milito. Publika elmonro de la portreto de Brown kiel simpla varsoviano ne estas anekdota en la nuna politika kunteksto de Pollando. Montri spurojn de la transnacia kaj transraca eco de la varsovia insurekcio ne kongruas kun la hodiaŭa naciista historia diskurso, kiu kreas artefaritan puran polecon.

Aliloke en la urbocentro, fine de sakstrato, kie ankoraŭ staras vico de burĝaj palacoj atestantaj pri la pompo de la 19-a jarcento, troviĝas eta, unuĉambra artgalerio, kies famo delonge

trapasis la naciajn limojn. Galerio Foksal estis fondita en 1966 kaj fariĝis rapide la monro-fenestro de avangarda arto en Pollando: ĉiuj famaj polaj artistoj kiaj Tadeusz Kantor aŭ Henryk Stażewski ekspoziciis en tiu loko. Krom dum la militleĝaj jaroj, kiam ĝi estis fermita, galerio Foksal estis konstante financita de publikaj subvencioj. Ĝis hodiaŭ ĝi ne privatigis. Tamen ĝi ne ricevas sian monon de la ŝtato, sed de la regiono Mazovio, kiu ĝis nun ne estis konkerita de PiS. Ĉisomere la galerio prezentas ekspozicion de brita artisto Nick Thurston (naskiĝinta en 1982) titolitan "Malamo-biblioteko". La instalaĵo estas rezulto de esploro pri la lingvaĵo, kiun eŭropaj ekstremdekstraj grupoj uzas en interreto cele al rekrutado de novaj anoj. La planko estas ornamita per la eŭropa flago, sed sur ĉiu stelo staras unu platformeto kun libro, en kiu estis kolektitaj la diskursoj de dek du el la plej potencaj faŝistaj grupoj aktivaj. Po unu por lando. La instalaĵo montras krome la foston inter la publika prezentiĝo de tiuj organizaĵoj kaj ilia ĉiutaga diskurso dokumentita en la interretaj forumoj. Tiu duobla vizaĝo estas motoro de la socia antaŭeniĝo de tiuj ekstremdekstraj grupoj, el kiuj dudek en la lasta jardeko aniĝis al regantaj koalicioj tra la eŭropa kontinento.

Rezisti en kultura kampo certe ne sufiĉas, sed la politiko ne prepariĝas nur ĉe la voĉdonado. Tion PiS perfekte komprenis, kaj klopodas kiel eble plej intense kaj profunde influi la mensojn por rezisti al la malferma horizonto de Eŭropo kaj enŝlosi ilin en iun tradician polecon, kiu neniam ekzistis. Pollando bedaŭrinde ne estas la sola lando, kiu en la lastaj jaroj trairas tiun vojon.

PASCAL DUBOURG GLATIGNY



W. Fangor. *Forĝi la falĉilon*. 1954. Varsovio, Muzeum Warszawy

Oni diras ke islamanoj minacas Okcidentajn moralojn, sed kio estas Okcidentaj moraloj?

Grava kaj polemika temo nuntempe estas enmigrado kaj rifuĝintoj, principe enmigrado de islamanoj al Eŭropo. Multaj homoj avertas ke estas danĝero al Okcidenta civilizo ĉar ili ne havas "Okcidentajn moralojn". Ĉi tiu estas stranga opinio pro kelkaj kialoj, kiel la ideo ke asimilo tute ne okazos kaj du apartaj popoloj ial ne kapablas loĝi kune. Tamen, la plej stranga afero estas ke neniuj scias kio estas Okcidentaj moraloj.

Eĉ malfacilas diri kio/kie estas la Okcidento. Mi mem venas el la okcidenta marbordo de Irlando, do ĉie en Eŭropo estas orienten de mi. Oni ĝenerale konsentas ke verŝajne estas Usono kaj iom da Eŭropo, sed malfacilas esti pli preciza. Ĉu Orienta Eŭropo? Ĉu la Balkanoj? Ĉu Rusio? Ili opinias ke jes, sed aliaj Okcidentuloj malkonsentas. La homoj kiuj kontraŭas islaman enmigradon ofte ankaŭ kontraŭas orienteŭropan enmigradon, ofte pro la samaj kialoj (timo pri kulturo kaj laboro). Do kvankam la registaro de Hungario kaj Pollando opinias ke ili defendas Eŭropon kontraŭ islama invado, ironie la Okcidento estas tiel nekonvenigante al ili kiel al islamanoj.

Do kio estas okcidentaj moraloj? Oni verŝajne dirus liberecon kaj demokration. Sed Eŭropo ankaŭ inventis komunismon kaj faŝismon, tiuj (bedaŭrinde) ankaŭ apartenas al la historio kaj kulturo de la Okcidento. Eĉ libereco kaj demokratio estas novaj evoluoj, kiuj nur aperis dum la pasinta jarcento. Okcidenta Eŭropo nur demokratiĝis antaŭ malpli ol cent jaroj (depende de la loko kaj kiel oni difinas demokration) kaj antaŭ dudek kvin jaroj en Orienta Eŭropo.

Ĉu tia nova evoluo vere estas kerna valoro? Kio pri la centoj da jaroj antaŭ demokratio, kiaj moraloj ekzistis? Se Orienta Eŭropo povas atingi Okcidentajn valorojn post nur dudek jaroj, ĉu islamanoj ne povas fari la samon? Ne pensu ke demokratio estis natura evoluo, ĝi nur kreiĝis post jardekoj de strebado kaj milito. Multaj eŭropanoj kontraŭstaris ĝin kaj provis detrui ĝin. Do se demokratio kaj libereco estas novaj evoluoj en Eŭropo

sen longa historio, eble ĝi ankaŭ evoluigos en Islamaj landoj. La araba printempo montris ke araboj deziras liberecon tiel forte kiel okcidentuloj.

Oni diras ke islamanoj ne respektas virinojn kaj kontraŭas egalajn rajtojn. Sed malmultaj okcidentaj homoj estas feministoj kaj iuj opinias ke feminismo detruas Okcidentan civilizon. La Biblio estas tiel seksisma kiel la Korano, kaj dum longa tempo virinoj ne havis egalajn rajtojn pro la kristana religio. Kiel oni konsideru genran egalecon ia Okcidenta valoro kiam ni ankoraŭ ne atingis ĝin? Virinoj ankoraŭ gajnas pli malaltajn salajrojn kaj la plej multaj laborestroj, politikestroj kaj sociestroj estas viroj.

Kulturo rilate al seksperforto estas grava problemo tra Eŭropo. Oni ofte ignoras asertojn aŭ kulpigas la viktimojn, dirante ke ŝi allogis la seksperforton pro ŝia agado, drinkado aŭ vestaĵo. Mi ofte legis simpatiojn al la atakanto, dirante ke li estas bonulo, estis tro ebria aŭ nur faris malgrandan eraron. Sed se la atakanto estas islamano, ne ekzistas simpatio, oni tuj kulpigas la tutan religion kaj deklaras nacian krizon. En Irlando, virinoj ne rajtas ricevi abortigon kaj devas sekrete vojaĝi al Britio. Ĉu islamanoj minacos ĉi tiun Okcidentan moralon?

Asertoj ke islamanoj estas kontraŭ samseksemuloj estas hipokritaj pro la noveco de egaleco kaj plenaj edzaj rajtoj. Samseksemeco estis kontraŭleĝe en Irlando ĝis 1993 kaj GLAT-uloj suferis grandan diskriminacion, ekzemple religiaj lernejoj (kiuj estas preskaŭ ĉiuj lernejoj) rajtis maldungi ilin kaj malsanulejoj ne akceptis sangon de samseksemuloj. Kontraŭsamseksemeco ne malaperis en Eŭropo kaj orientaj landoj ankoraŭ ne havas egalecon.

Maldekstruloj diras ke islamanoj atakos la Okcidentan valoron de sekulareco. Sed krom Francio

kaj Skandinavio, malmultaj Eŭropaj landoj estas sekularaj. La Irlanda konstitucio ankoraŭ diras ke reg-rajtoj venas de Dio, ne la popolo. La katolika eklezio ankoraŭ posedas preskaŭ ĉiujn lernejojn kaj malsanulejojn en la lando. Religio havas eĉ pli fortan rolon en Usono kie ĉiuj politikistoj devas esti religiuloj.

Ironie, la registaro de Hungario deklaris ke islamanoj atakas la kristanisman heredaĵon de Eŭropo (kvazaŭ jarcentoj de religiaj militoj, persekutadoj kaj antaŭjuĝoj estas komunaĵo ke ni ĉiuj valoras). Do ĉu Eŭropo estas sekulara regiono kiu islamanoj iĝos religia, aŭ ĉu Eŭropo estas religia regiono ke islamanoj iĝos sekulara? Ŝajnas ke Islamo estas blanka muro, kie oni povas ĵeti iun ajn timon. La maldekstruloj timas la eniron de religio al publika vivo kaj la dekstruloj timas la eliron, ambaŭ senpense pri kio islamanoj vere volas kaj pensas. Neniu el la timigistoj pensas ĉu la islamanoj deziras ŝarion nur por si mem anstataŭ por la tuta socio aŭ kiel eta malplimulto povas regi



Islamanoj kiel elcento de la tuta popolo
en ĉiu lando de Eŭropo

la tutan kontinenton.

Kio pri paco, ĉu tio estas kerna okcidenta valoro, kiu mankas al la perfortaj islamanoj? Oni povas kredi tion nur se oni neniam malfermis historian libron. Ĝis antaŭ 60 jaroj estis preskaŭ eterna milito en la Okcidento, kaj la historio de Irlando estas pli-malpli daŭra ribelo kontraŭ Britia rego. La historio de la Okcidento plenas je milito kaj religia ekstremismo, nur estas trompo diri ke nia socio fondiĝas sur paco. Okcidentaj landoj ankaŭ havas longan historion de imperialismo kaj invadis preskaŭ ĉiun landon en la mondo. Eble islamanoj miras kial okcidentuloj estas tiel perfortemaj?

Kvankam iuj opinias ke islamanoj estas perfortemaj, ĝis antaŭ 20 jaroj, la stereotipa teroristo estis irlandano. Dum jarcentoj, britoj kaj usonanoj timis ĉu irlandanoj havis la pravajn valorojn kaj moralajn por aniĝi en la lando. Oni opinis ke ili estis tro perfortemaj, tro religiemaj, tro drinkemaj kaj tro krudaj. Ofte okazis panikoj ke ondoj de irlandanoj forbalas Okcidentajn moralajn.

Tro multe da debatoj pri islamo opinias ke ĉiuj islamanoj pensas sammaniere. Se iuj islamanoj en Irako volas ŝarion, oni agas kvazaŭ ĉiuj islamanoj volas la samon. Estas freneza pensi ke usonanoj, britoj, francoj,

grekoj, poloj, svedoj kaj rusoj estas la samaj, do kial oni pensas ke ĉiuj islamanoj de Maroko ĝis Indonezio estas la samaj? Fakte la timigistoj ne diras ke jam ekzistas islamaj landoj en Eŭropo. Bosnio, Kosovo kaj Albanio; ĉiuj havas islaman plimulton sed neniu el ili havas ŝarion aŭ forhakas kapojn. Ili estas liberaj kaj sekularaj landoj, do evitente islamo povas ekzisti en libera Eŭropo.

Mi ankoraŭ ne scias kiel la tiel nomata islama ondo funkcias. Eĉ se unu miliono de islamaj rifuĝintoj venas al Eŭropo, la tuta islamana popolo nur estus 5 milionoj el 500 milionoj. Kiel 1% regus ĉiujn? Se mia najbaro estas islamano kun alia kulturo kaj moralo, kiel tiu ŝanĝos mian vivon? Ĉu mi subite ekmalamos demokration kaj liberecon? Ĉi tiu memorigas min pri la debato pri edziĝaj rajtoj por samseksemuloj, oni avertis ke se ĝi okazus, tradicia geedziĝo endanĝeriĝus. Sed nesamseksemuloj ne subite maledziĝus pro la ŝanĝo, do mi dubas ke neislamanoj ankaŭ subite ŝanĝiĝus.

Oni ofte preparolas asimilon kaj demandas ĉu islamanoj estas asimileblaj. Sed neniu scias kion signifas asimilo. Ĝenerale temas pri la nacia lingvo (paroli france en Francio ktp) sed krom tiu estas tre malklara. Se iu portas tradician araban vestaĵon, ĉu tiu estas problemo? Aŭ ĉu ĉiuj en Francio devas porti tradiciajn francajn vestaĵojn? Ĉu manĝi araban manĝaĵon estas kontraŭ asimilo? Sed ĉu homoj ne rajtas manĝi ion ajn en sia propra hejmo? Certe ne ĝenas min se enmigrintoj manĝas eksterlandan manĝaĵon aŭ aŭskultas eksterlandan muzikon. Fakte ĉi tiuj pliriĉigas la landon kaj la plejparto de muziko kaj manĝaĵo en Irlando estas eksterlande.

Vere ne estas hordo de islamanoj venante por detrui nian socion. Okcidentaj moralaj (kio ajn ili estas), ne estas unu kulturo, ne estas unu vidpunkto. Estas amaso de opinioj kaj vidpunktoj. Diri ke ĉiam ekzistis unu unuiginta kristana Okcidento kontraŭ islama invado estas mensogo kaj falsa historio. La okcidento ĉiam estis kaj estas multkultura kaj loko kie diversaj popoloj kune loĝas.


ROBERT NIELSEN

<https://teokajlibroj.wordpress.com/>


Islam in Europe

Perception of Islam

% of respondents who think that Islam is not compatible with the West, 2013




Terrorism arrests in Europe




Muslim population

% of total, 2010



Public estimates of Muslim population

%, 2014



Homoj kutime troigas la numeron de islamanoj en sia lando. Homoj ofte pensas ke estas kvaroble la vera numero.

Korano

Sinjorinoj, sinjoroj,

Mi legis *Sennaciulon* (majo-junio 2017) kaj mi volas respondi al diversaj tekstoj, kiujn mi legis tie, ekzemple kanzono kaj redaktangulo, kaj ankaŭ aliaj pri naciismo kaj prijuĝoj. Eble kelkaj ne komprenis, ke multe da personoj timas nun la rifuĝintojn kaj ne volas ilin ĉi tie en Eŭropo.

Vi devas scii, ke preskaŭ tuta mia familio estas islama (el Alĝerio), sed ne mi. Sed... mi legis kaj legas la Koranon. Mi konas ĝin tre bone. Kaj en la Korano estas skribite proksimume 200 fojojn, ke la islamanoj devas mortigi la "miskredantojn". La miskredantoj ne estas homoj, kiuj ne kredas. Estas homoj, kiuj ne estas islamanoj.

Vi povas legi la suraon 2an, tielnomata pri la "bovino", versago 187. Ĝi komenciĝas jene: "Mortigu ilin ĉiujn...". Temas pri la malislamanoj. Nun la murdistoj estas islamanoj, ĉie en la planedo. Kial? Ĉar estas skribite tiel en la Korano. Kaj mi bone komprenas, ke la malislamanoj timas.

La fundamentistaj islamanoj celas la morton de la malislamanoj. Ili estas por la sklaveco. Ili pensas, ke la virinoj estas nur duonviroj. Ili subtenas edzinigon de junaj knabinoj. Ili ankaŭ favoras la ŝtelon de la posedaĵoj de la malislamanoj. Muhammad estis militestro. Li mortigis ulojn centope.

Tiuj fundamentistoj, kiuj klopodas esti agnoskitaj kiel la "veraj" islamanoj, ne ŝatas la maldekstrulojn. En Alĝerio, ili mortigis multajn (en la jaroj 90-aj kaj 2000-aj). Mi devas diri: por mi, Islamo estas vere naciismo.

Kaj multe da rifuĝintoj estas islamanoj. Do, mi diras... Se la islamanoj volas la pacon, ili forigu de la Korano la du cent alvokojn al la mortigo de la miskredantoj.

VIVIANE TITS.

TRA LA MONDO - ORIENTA AZIO

Filipinanoj protestas kontraŭ ASEAN, Trump

Filipinanoj lanĉis seriojn de manifestacioj kontraŭ la nun okazanta pintkunveno de la t.n. Asocio de Sud-orientaziaj Landoj (angle: Association of Southeast Asian Nations, ASEAN) kiu okazis de la 13a ĝis la 14a de novembro, specife kontraŭ usona imperiismo kaj ĝia nuna ĉefo, prezidento Donald Trump.

Filipinanoj kredas, ke ASEAN estas instrumento de Usono por plifortigi sian tenon de potenco laŭ politika, ekonomia, kaj milita faktoroj super la sudorientazia regiono, ĉeestante eĉ se ĝi fakte ne apartenas al tiu organizo. Plie, interalie la pintkunveno ebligas multajn interkonsentojn kiuj pli profunde enkondukos liberan komercadon – tiel pli forte endanĝeriganta la lokajn entreprenojn kaj produktojn de la lando.

Ankaŭ partoprenanta la pintkunvenon estas Shinzo Abe, ĉefministro de Japanio. Kredeble, li volas uzi ĉi tiun kunvenon por puŝi militisman alvenon al la problemo pri Nord-Koreio, same kiel Trump. Fakte, pritrakti Nord-Koreion estas unu el la

ĉefaj tagorderoj de ĉi tiu kunveno. Ankaŭ ĉeestas Justin Trudeau, ĉefministro de Kanado, kiu ankoraŭ ne pritraktas la problemon pri tio, ke kelkaj tunoj da rubaĵoj estis ŝipitaj al Filipinoj de lia lando.

La manifestacioj okupis ĉiujn placojn proksime al la usona ambasadejo, proksime al kiu okazas la pintkunveno. Multaj sociaj sektoroj ĉeestis: gejunuloj, laboristoj, farmistoj, virinoj, urbaj malriĉuloj, indiĝenaj popoloj, viktimoj de la lastatempa milito kontraŭ ekstremistoj en la suda urbo Marawi.

La manifestacioj tamen ne estis pacaj – dikaj aroj da policistoj blokis ĉiujn vojojn cele al la kunvenejo, kun lignaj batiloj, kaj eĉ utiligis fajrobrigadon por bombi (kredeble malpuran) akvon al manifestacioj. Tiu pritrakto pri manifestacioj ne ŝanĝiĝos, kaj ili povus utiligi pli seriozajn metodojn, ekzemple larmgasojn. Jam la pasintaj manifestacioj, ĉi-matene la plej lasta, estis kun perforto kaj ĉirkaŭ 20 manifestacioj estis vunditaj.

Antaŭ du jaroj, mi devis esti portita al la hospitalo antaŭ du jaroj kiam iu policisto forte batis mian manon per ligna bastono, manifestaciante kontraŭ la okazigo de la pintkunveno de la Azia-Pacifika Ekonomia Kunlaboro (APEC). Ĉi-foje ankaŭ aliaj studentoj grave vundiĝis pro la perforta kolizio inter manifestacioj kaj policistoj. Ni vidis kiel perfortemaj estos la ŝtataj agentoj, kiuj ĉiam servas la klasojn regantajn eĉ se tio signifas ke ili devas uzi ian forton kontraŭ la popolamasoj.

Kiel iris protestoj en viaj landoj? Mi aŭdis, ke ekzemple en Sud-Koreio gejunuloj sukcese lanĉis "pulm-protestojn" kaj eĉ kelkaj opoziciaj parlamentanoj silente protestis kiam Trump vizitis la nacian parlamenton de Sud-Koreio.

Ni devas kune protesti kontraŭ usona imperiismo kaj ĉiujn politikojn, kiujn ĝi altrudas al la azia-pacifika regiono.

Solidarece,

ALBERT STALIN GARRIDO

Filipinoj

Originala projekto en Grekio: Ĥora

Labori por rifuĝintoj sen hierarkio...

De pluraj monatoj jam, mi laboras kun rifuĝintoj, mi ĉefe instruas kaj instruis la anglan al homoj, kiuj certe neniam loĝos en lando, kie tiu lingvo estas parolata! Tamen, antaŭ kelkaj semajnoj mi malkovris eblecon finfine instrui mian lingvon, la francan. Kaj tio estas kiel mi tute hazarde malkovris Ĥora-n...

Ĥora (aŭ "Khora", ĉar estas nomo elektita ne de grekoj, sed de alilandanoj, uzantoj de la angla) estas asocio kiu helpas al rifuĝintoj en Ateno.

Antaŭ labori por Ĥora, mi estis volontulo en alia asocio, kie teorie neniu estras, ni ĉiuj estis egalaj, sed tio estis nur teorio kaj en la realo, nia gvidanto estris la grupon, laŭ sia volo, kaj pluraj grumblis...

Do por reveni al Ĥora... Ĝi havas multegajn membrojn, la domego (malnova presejo) estas kiel abelujo. Kiel abelujo, ĝi bruas, sed ankaŭ kiel en abelujo, ĉiu havas farotajn taskojn. En Ĥora la organizo estas laŭ laborgrupoj: la kuirejo, la vestovendejo (kiu fakte estas «donejo», ĉar oni ne pagas...), la virina grupo, la grupo kiu organizas aktivaĵojn por infanoj, la ĝardenistoj (nu, estas nur ĝardeneto en la 6a etaĝa teraso, sed tamen...), la instrugrupo (en kiu mi membriĝas) ktp. Ni ĉiuj estas volontuloj, multaj estas junuloj, pluraj laboras dum kelkaj semajnoj, reflugas hejmen por gajni iom da mono kaj denove agas en Ĥora poste...

En Ĥora, ĉiu laborgrupo kunvenas unufoje semajne kaj ĉiu grupo ankaŭ sendas du personojn por reprezenti la grupon en la semajna ĝenerala kunveno. La originaleco de Ĥora kuŝas ĉefe en la maniero decidi kiel agi: oni neniam voĉdonas! Vi eble pensos, ke tio ne eblas, ankaŭ, sen hierarkio, sen estro... Nu, la ideo estas, ke oni diskutas, ŝanĝetas la diskutatan proponon ĝis kiam ĉiuj konsentas...

Post diskuto, oni havas eblecon indiki per movoj de siaj manoj ĉu oni konsentas, ne certas, ne konsentas aŭ eĉ blokas la proponon. Kunvenoj estas grava parto de Ĥora. Jen ekzemplo de kunveno, malfermita al ĉiuj: «Kiel oni kreas la kondiĉojn por ke ĉiu estu gvidanto de la komunumo?»

Alia interesa aspekto, kiun junulo el Britio substrekis por konkludi enkondukon al la projekto (kiun mi ĉeestis, kiel estas devigo de ĉiu nova volontulo): nia celo estas atingi perdon de nia laboro, ke rifuĝintoj kaj lokaj homoj funkciigu la projekton.

Por pli bone kompreni pri la funkciado de Ĥora, mi decidis intervjui du el la plej «malnovaj» membroj, Camilla kaj Claire.

Annie: Saluton, bonvolu diri kiuj vi estas kaj kia estas via ligo kun Ĥora.

Camilla: Mia nomo estas Camilla kaj mi devenas el Danlando. Mi vivas en Grekio ekde Januaro 2016. Mi komencis agi en Lesbos kaj estis parto de la grupo kiu starigis Ĥora-n en aprilo 2016, kooperativan Ĥora-n, kiu nun estas asocio kaj socia centro ĉi tie en Ateno.

Claire: Mi estas Claire, mi devenas el Kanado. Mi komencis implikiĝi en helpo al rifuĝintoj en 2016 ankaŭ, ĉirkaŭ marto. Proksimume unu jaron poste mi pasigis kelkajn semajnojn en Lesbos kaj alvenis al Ĥora. Ĝi estas projekto kiu plej bone kongruas kun mia idealo.

Annie: Kial kooperativa Ĥora iĝis asocio?

Camilla: Ni provis esti kooperativo ĉar ideo pri kooperativo estas en harmonio kun la valoroj de Ĥora, sed esti kooperativo en Grekio estas tre malfacile. Ni provis dum unu jaro esti agnoskitaj kiel kooperativo kaj tio ankoraŭ ne okazis, do ni bezonis kompromison kaj tiel ni kreis asocion anstataŭe. Ni ankaŭ kreis danan asocion, unue por havi internacian

bankkonton kaj ankaŭ por havi eblecon kolektigi monon eksterlande. Ni ne povas havi nur grekan bankkonton ĉar ĝi estus ne sufiĉe fidinda. Estas ankaŭ Ĥora Brita asocio, sed pro Brexit, tio ne sufiĉas.

Claire: Jes niaj kialoj estis financaj, sed estas ankaŭ maniero krei reton tra Eŭropo kaj gardi ligan kun antaŭaj volontuloj kiam ili reiras hejmen kaj ne vere scias kiel daŭre agi por Ĥora.

Camilla: Kaj ankaŭ maniero informi pri la situacio en Grekio, pri la homoj kiuj estas enfermitaj kiel en kaptilo en tiu ĉi lando...

Annie: Kiel oni povas membriĝi en la greka asocio?

Claire: Nur donante sian nomon! Iu ajn povas iĝi membro kaj ni esperas havi plimulton da rifuĝintoj en la asocio. Esti membro de asocio ankaŭ povas helpi rifuĝintojn, se ili petas azilon en Grekio.

Annie: Dankon pro tiuj informoj, sed kiel esperantisto mi ankoraŭ havas demandon... Kion vi opinias pri la konstanta uzo de la angla kiel komunikilo?

Camilla: Certe, ĉiam estas lingva defio. Denaskaj parolantoj devas paroli malrapide, klare, konscii ke ili ne povas uzi slangon. Kaj ni ankaŭ havas tradukistojn.

Claire: Ni daŭre havas tiun problemon. Estas eble unu el la plej gravaj problemoj kiujn ni havas. Kaj pli malpli ĉiu monate la ideo havi kunvenon en la lingvo de la preleganto revenas. Tamen estas malfacile solvi kiam la majoritato parolas la anglan. Ni vere ne havas la necesajn ilojn.

Camilla: Ni iam havis trejnadon plenumita en la araba kun traduko al la angla, sed proksimume 80% de la partoprenintoj parolis la anglan, do ĝi eĉ tiam estis multe uzita...

Nu, vi eble diros al mi «jen alia asocio de bonkoraj homoj el riĉaj landoj, kiuj helpas al malfeliĉaj

rifuĝintoj», do mi ŝatus aldoni ion, kiun junulo el Sirio, nome M.D. diris dum iu kunveno. Li diris «Ĥora estas tute malsama de aliaj projektoj, mi vivis en pluraj kampoj. En tiuj kampoj oni traktas rifuĝintojn kiel bestojn, ni estas numeroj. Mi bone scias pri tio, ĉar en ĉiu kampo, kie mi loĝis, mi agis kiel volontulo, kaj mi mem traktis homojn kiel bestojn kun numeroj...»



EL LA SAT-ADMINISTREJO

Financa bilanco de SAT-Kongreso en Seulo

FINANCA ELSPEZO

Informilo (varbigilo por kongreso)	475,70 €
Kongresejo / Hotelo kun manĝo	16 899,62 €
Kultura programo	1 239,16 €
Desegnaĵoj	230,77 €
Kongresmaterialoj	955,04 €
Organizaĵo	721,43 €
Trinkaĵo en kongreso	17,69 €
Ekskursoj kun manĝo	1 451,19 €
Aŭtobuso UK al 90a SAT kongreso	192,31 €
Sendokosto de SAT-membro-karto	2,22 €
TOTALA ELSPEZA SUMO	22 185,13 €

informoj_financoj@satesperanto.org
 kaj OKK : paze23@gmail.com

90A SAT-KONGRESO

ENSPEZOJ DE LA KONGRESANOJ **23 630,95 €**

KROMA ENSPEZO

Aŭkcio	276,15 €
Monhelpo de LEE Hyeonwoo	769,23 €
Mandala kotizo	200,00 €
Libro Servo	113,85 €
MONSUMO	1 359,23 €

TOTALA ENSPEZA SUMO **24 990,18 €**

TOTALA ELSPEZA SUMO **22 185,13 €**

PROFITO **2 805,05 €**

REPAGO AL SAT

Antaŭpago SAT	3 000,00 €
Profito duono	1 402,53 €
Monsumo	4 402,53 €

Kartvelio: Ĉesigu la kontraŭ-sindikatajn persekutojn en la entrepreno Rustavi Azot

En Kartvelio, kemilaboristoj frontas subpremon. Eks-modelo pri sociala sinteno, la produktanto de sterko "Rustavi Azot", de post la alveno de nova proprietulo komence de 2017, persekutas la surlokan sindikaton, la Sindikaton de la Metalurgio, Minoj kaj Kemio de Kartvelio (TUMMCIWG), aliĝintan al IndustriALL. La dungitoj de la entrepreno suferas nun pri persekuto kaj subpremado, pro siaj sindikataj apartenoj. Sub la premo de la alta direkcio de la entrepreno, la kontrolistoj de la laborejo devigas ilin ekŝiĝi el sia sindikato. En la celo detruigi la surlokan sindikaton, la estraro maldungis kontraŭleĝe 350 personojn en januaro-februaro 2017.



De marto 2017, TUMMCIWG provas relanĉi la intertraktadojn kun la direkcio, sed vane. La sindikato petis plurfoje intervenon de la Ministerio pri Laboro, Sano kaj Socialaj Aferoj. Sed ĝi malsukcesis kunigi la partiojn ĉe kunsido. Male, la ŝanceliĝanta teniĝo de la ministerio faciligis kaj kuraĝigis la diskriminaciajn agojn de la direkcio de Rustavi Azot. Malobserve kun la nacia leĝaro kaj la konvencioj n-roj 87 kaj 98 de la IOT, dekoj da laboristoj estas devigitaj ekŝiĝi el la TUMMCIWG kontraŭ sia volo.

Informo el LabourStart

http://www.labourstartcampaigns.net/show_campaign.cgi?c=3635

Belorusio: Ĉesigu la atakojn kontraŭ la sindikataj gvidantoj



La 2-an de aŭgusto, Gennady Fedynich, prezidanto de la sindikato de la laboristoj en industrio de radio kaj elektroniko (REP) kaj membro de la ekzekutiva komitato de IndustriALL, Ihar Komlik, ĉeflibrotenisto kaj gvidanto de la organizaĵo REP en la urbo Minsk, kaj kelkaj aliaj membroj de la personaro estis arestitaj kaj pridemanditaj de la belorusiaj aŭtoritatoj.

Ambaŭ sindikataj gvidantoj estas nun submetitaj al enketo pro supoza grandskala impostevito kaj prunto je 3 ĝis 5 jaroj. Ihar Komlik estas enkarcerigita de la 2-a de aŭgusto. La akuzoj pri nepagitaj impostoj rilatas al solidareca subteno ricevita de la sindikato en 2011, kaj tute ne estas privata mono. La akuzoj estas senbazaj, kaj celas detruigi la sindikaton, reprezalie kontraŭ la aktiva sinteno de ties gvidantoj, kaj ilia laboro por protekti la sociajn kaj ekonomiajn interesojn de la belorusiaj laboristoj.

Kuniĝu kun ni por postuli tujan liberigon de Ihar Komlik, kaj ĉesigon de la punaj persekutoj kontraŭ Gennady Fedynich.

Informo el LabourStart

https://www.labourstartcampaigns.net/show_campaign.cgi?c=3520

Minimume malgranda laborsalajro

Latviaj salajroj estas pli proksimaj al bulgariaj ol al luksemburgiaj. La ĉefa statistika institucio de Eŭropa Unio – Eŭrostat – kompilis liston de minimumaj salajroj laŭ landoj de EU. Latvio en tiu ĉi listo estas la tria en la fino. Latvio sin trenas en la vosto de la listo jam de tre antaŭlonge kaj, juĝante laŭ ĉio, Latvio estos tie dum longa tempo.

En la plej riĉa lando de EU – Luksemburgio – la minimuma salajro estas naŭoble pli granda ol en Bulgario, la plej malriĉa lando de EU. Laŭ oficialaj indikoj de Eŭrostat, en la duklando oni ne rajtas ricevi malpli ol 1999 eŭrojn monate, kaj samtempe en Bulgario la minimumo estas 235 eŭroj. En kvino de landoj kun la plej granda minimuma laborsalajro, krom

Luksemburgio, estas Irlando (1563 eŭroj), Nederlando (1552 eŭroj), Belgio (1532 eŭroj) kaj Germanio (1498 eŭroj).

Respektive, la plej malgranda salajra minimumo estas en Bulgario (235 eŭroj), Rumanio (275 eŭroj), Latvio (380 eŭroj), Litvio (380 eŭroj), Ĉeĥio (407 eŭroj).

Por esti justa, oni notu, ke ekde

01/01/2018 la latvia minimuma salajro kreskos ĝis 430 eŭroj. Litovoj kaj ĉeĥoj ankaŭ ekpensis pri la altigo de la minimuma salajro.

La ĉefa statistika institucio de EU krome notas, ke 6 el 28 ŝtatoj de EU ĝenerale ne uzas en sia sociala sistemo la terminon "minimuma salajro". Tiuj 6 estas Danio, Svedio,

Italio, Cipro, Slovenio, Kroatio. Tiu ĉi nocio en tiuj 6 landoj ne ekzistas – oni pagas tian salajron, kian oni volas pagi.

En Latvio, siatempe la nunan situacion rilate al la minimuma salajro klarigis gvidantino de Servo de Ŝtataj Enspezoj, Ilze Cirule: "Se rigardi al entreprenado en la tuto, tiam pli ol duono de la labordonantoj en la lando

pagas al laboruloj malpli ol la minimuman salajron."

SERGEJ VLADIMIROV

Gazeto Segodnja, 10/08/2017

Tradukis Andris Natinš

Noto de la redakcio: "Noruzo"

(Newroz aux Naw-Rûz ĉe la bahaanoj, aliskribita en Esperanto "Naŭruzo" aŭ "Noŭruzo") signifas la novan jaron, fakte la novan tagon de la printempo (en la persa "no": nova, kaj "rouz", tago). Ĝi estas la tradicia Irana novjara ferio en grandanparto de Sud-Eŭrazio, de Irano ĝis Kazahio. La festo estas ankoraŭ tre populara ĉe la diverslandaj kurdoj.

Tamen, Noruzo [1]

La Noruzon denove prifestis la kurdoj, eĉ se la persekutado estis terura. Malgraŭ ĉio, miloj da homoj festis, dancante ĉirkaŭ la fajro, la novan jaron kaj la komencon de la printempo. Amedo [2] estis denove la centro de la festo. La turka registaro malpermesis la celebradon en multaj urboj, sed en kelkaj el tiuj, spite al la malpermeso, la kurdoj eliris surstraten: en Istanbulo, Ĝiziro [3], Gevero [4]...

Pasintjare estis similaj malpermesoj, sed la kurdoj disdegnis ilin kaj organizis festadojn, eĉ se estis fortaj interpuŝigoj kun la polico. Nunjare, kontraŭe, la sinteno de la kurda movado ŝanĝiĝis, por ke la etoso ne pli malboniĝu. La intenco estas ne pliintensigi la streĉitecon fronte al la referendumo, kiun la turka prezidento, Recep Tayyip Erdogan, kunvokis por la 16a de aprilo. La kurdoj, eĉ se ili alvokis bojkotadon, havas enorman laboron.

Sojle de la referendumo la etoso malicas. De kiam la PJD [5] perdis la majoritaton en junio de 2015 la politika subpremado estas terura. La kurda partio PDP [6] superis la barieron de la 10% kaj akiris reprezentantaron je la parlamento. La respondo de Ankaro estas terura de post tiam. Laŭ la raporto publikigita pasintsemajne de UN de tiam oni mortigis 2000 personojn, kaj inter 355 000 kaj 500 000 devis forlasi sian domon.

Peniga estas la situacio en Norda Kurdio [7]. Malaperigoj, torturoj,

arestoj, sieĝoj, ruinigo de urboj kaj vilaĝoj, detruado de kulturaj heredaĵoj, perforto kontraŭ virinoj, limigado de la esprimlibereco, forfermo de amas-komunikiloj, persekutado kontraŭ aktivuloj...

Malpermesoj

Malgraŭ ĉio, en Amedo amaso kolektiĝas ekde la mateniĝo. Osman Baydemir, deputito de la PDP, ĉeestis la celebradon: "Hodiaŭ 500 000 homoj sendis la faŝismon al fek, kaj bonvenigis la liberecon".

Li referencas al la kunvenintoj en Amedo. La etoso varmas kaj la pasio kaj kuraĝo de la kurdoj ne humiliĝas. Eĉ se la polico trudis severajn malpermesojn. Kontraŭ la enirantoj al

la parko Newroz la polico sturmas kaj ĵetas fumpotojn. Estas amaso da arestitoj: temas pri 300 personoj, laŭ la kurda movado. Per la laŭtparoliloj oni sendas mesaĝon: oni ne rajtas krei politikajn sloganojn. Tamen, la kurdoj respondas fajfante kaj kriante *Bijî Apo!* ("Vivu Apo") – la kromnomo de Abdullah Oĉalan – kaj *Bijî Kurdistan!* ("Vivu Kurdio"). Sammaniere oni sciigas, ke oni ne rajtas fari la venkosignon per la fingroj – la membroj de la internacia delegitaro devis kovri tiun signon, aperanta en ties atestiloj -. Sed la manoj estas ĉie, levitaj, proklamante la venkon.

La listo de malpermesitaĵoj longas: la koloroj de la kurda flago estas malpermesitaj, kaj la polico konfiskas kaptukojn kaj vestojn, inkluzive de harligiloj, kun la koloroj ruĝa, flava kaj





verda, en la priserĉontroloj starigitaj ĉe la parkenirejoj. La kurda lingvo mem estas malpermesita dum la Kurda Nacia Tago. En plejmulto el la flagoj estas skribite *Hayir!* ("Ne!" en la turka), referencante al la referendumo, kaj en nur malmultaj *Na!* ("Ne!" en la kurda).

Do, la Noruzon celebras la kurdoj rigardante al la referendumo de la 16-a de aprilo. Erdogan volas trudi prezidentisman sistemon pere de la pridemandado, por povi regi per ukazoj. La kurdoj denuncas, ke Erdogan utiligos la jeson por intensigi la subpremadon kaj la opreson. Ili argumentas, ke la prezidentisma sistemo kunportos totalismon, povcentrigadon, mortpunon kaj rajtmalobservon. Ili avertas, ke ĝi agos tute senpune persekutante pli siajn politikajn oponentojn.

Eĉ se kampanji favore al la neo estas malpermesite - ĝi estas terorisma delikto - por la kurda movado la ĉi-jara Noruzo estas deirpunkto por disvastigi mesaĝojn favorajn al la neo. Ayse Gokan mem, proparolanto de la Kongreso de la Liberaj Inoj [8], klarigis al Berria kial oni devas subteni la neon: "Ni devas subteni la prizonulojn, kiuj malsatstrikas jam de 35 tagoj, kaj la lukton de la kurdoj kiuj batalas en Ŝengalo [9] kontraŭ la Islama Ŝtato. Diri ne al Erdogan en la referendumo estas la nura vojo por superi la konflikton".

Timo kaj kuraĝo

Ĉi-jare oni perceptas la timon, kiun la persekutado kreis. Fakte, multaj homoj restis endome. Speciale instruistoj, kuracistoj, flegistoj...

ĝenerale tiuj, kiuj laboras en la publika sektoro. Post la puĉprovo de la pasintjara julio, oni maldungis 100 000 publikajn laboristojn pro tio, ke ili esprimis sian malakordon kun la politiko de Erdogan, kaj al la kurdaj laboristoj ofte oni imputis terorisman delikton. Sub la akuzo subteni la PLK-n [10] oni enkarcerigis 40 000 homojn, po milon semajne, inter ili politikistojn de la opozicio - oni enkarcerigis 8711 membrojn de la PDP-.

Tamen, multaj homoj, forpelinte sian timon, partoprenas pli fervore ol pasintjare. Senĉese estas krioj favore al la liberigo de Abdulah Oĉalan, Selahattin Demirtas kaj aliaj referencaj politikistoj. Ankaŭ oni memoras la partizanojn mortintajn en la milito kaj proklamas la liberecon de la kurda popolo...

La plej grava momento venas kiam, kune kun la ekbruligo de la fajro, centoj da homoj transpasas la barilon,



kiu ĉirkaŭas la protektozonon por la internacia delegitaro kaj celebrad-iniciatintoj. La ĝisnuna festa etoso krevas, kaj dancoj kaj kantoj, ĉirkaŭbrakumoj, ridoj kaj venksignoj intermiksiĝas. "Estas la tago de popolo, kiu volas esti libera", diras kurdo.

Notoj (Nomoj en la kurda lingvo krom la indikitaj):

- [1] Newroz.
- [2] Amed (Diyarbakir en la turka).
- [3] Cizîr (Cizre en la turka).
- [4] Gever (Yüksekova en la turka).
- [5] Partio de la Justeco kaj la Disvolviĝo (PJD)/Adalet ve Kalkinma Partisi (AKP), en la turka.
- [6] Partio Demokrata de la Popolo (PDP)/Partiya Demokratik a Gelan (PDG). Halklarin Demokratik Partisi (HDP), en la turka.
- [7] Norda Kurdio/Bakurê Kurdistanê. La kurda teritorio ene de la turka ŝtato.
- [8] Kongreya Jinên Azad (KJA).
- [9] Ŝengal.
- [10] Partio de la Laboristoj de Kurdio (PLK)/Partiya Karkerên Kurdistan (PKK).

Klarigoj:

Aŭtoro: Aratz Estonba.

Eŭska ĵurnalo Berria, la 22-an de Marto 2017-a.

Tradukis: NXC. Aprilo 2017-a.

Provlegis: AA kaj DS.

La noruzo [1] de 2017 en Kurdio

En tiu ĉi semajno ni havis unu el la du tagnoktoj de la jaro, en kiuj nokto kaj tago same daŭras (la alia estos post ses monatoj, en septembro). En la norda hemisfero, forlasinte la vintron, komencis la printempo, kaj la tagoj plilongiĝas; la sudan kaptis la aŭtuno, kaj la nokto forprenas minutojn al la tago. Tiun specialan momenton oni celebris en multaj lokoj tra la mondo. De jarmiloj, en Kurdio oni adoras la sunon ekbruligante fajrojn en la montoj. De jaro al jaro la 21-an de marto oni celebras, ke la forĝisto Kawa, venkinte la tiranon Dehok, liberigis la kurdojn. Oni omaĝas la simbolon de la suno bruligante fajron sur la tero.

Pasis 25 jaroj de post la sanga Noruzo de 1992. Pli ol cent homojn oni mortigis en la urboj de Kurdio en tiu marto. Jarduonon poste, la tiaman plej gravan verkiston Musa Anter oni forkaptis kaj murdis. Lia murportreto bonvenigis onin en la akceptejo de la ĵurnalo Azadiya Welat [2], fermita post la pasintjara puĉo. Poste estis fotografajvico kun la nomo “martiroj de la liberecesprimo”, la fotoj de la homoj, kiujn dum jaroj oni murdis en la lukto por povi sin esprimi libere en la kurda lingvo. Musa Anter mem tion resumis: “Se mia lingvo skuas la fundamentojn de via ŝtato, certe estas, ĉar cian ŝtaton oni fondis sur mia lando.”

Post jarcentkvarono, preskaŭ sendependa Kurdio naskiĝis en la teritorio, kiu antaŭe estis viktimo de la operaco Anfal [3], genocido ordonita de Saddam Hussein. De tie norden ekfajris milito, sed oni ne rezignas la rajtojn, kiuj tiom da sango kostis, eĉ se estas fermitaj lernejoj kaj amas-komunikiloj, vilaĝoj bruligitaj kaj detruitaj, ĵurnalistoj, verkistoj, hom-rajtaktivuloj kaj aliaj miloj da personoj enkarcerigitaj. La ĵus publikigita informo de UN kompilas la krimojn de Ankaro, kiel la masakron okazigitan en Ĝiziro [4] antaŭ jaro.

La fiasko de la asimilad-politiko de la Turka Respubliko kunportis kurdajn aktivulojn po milionoj. Post tri semajnoj, grandparte estos en la manoj de la turkiaj kurdoj, ĉu la intencoj de la prezidento Recep Tayyip

Erdogan prosperas aŭ ne. Se la kurdoj amase donos neon en la referendumo pri konstituci-ŝanĝo, kiu establigos prezidentisman sistemon kaj donos al li totalan povon, estos granda vango-frapo por Erdogan, kiu depost la pasintjara puĉo senlime agadas kontraŭ la opozicio.

La kurda movado montris kapablon rezisti en, ŝajne neebila, ekvilibro. Ĝi estas, alianco kun Usono, la gvidanto de la fortoj, kiuj en Sirio atingis la pordojn de Rakaho [5]. Malmultajn kilometrojn for, ĝi ĵus atingis akordon kun Moskvo, por ke Rusio ankaŭ havu sian lokon. Se ĉio bone disvolviĝos, tio estos pakto por garantii, ke en post-milita Sirio Roĵavo restu aŭtonoma teritorio. Ĝi mirigis la mondon en la batalejoj, iniciatis demokratan modelon por la administrado kaj politiko en Mezoriento kaj atingis komplacecon de la ĉefaj internaciaj potencoj en tiu minkampo, kiu ofte estas la diplomatio.

Tamen, ne ĉio brilanta estas oro. La danĝero ne venas nur de la ŝovinismoj turka aŭ araba. En Kurdio mem neniam estis bona rilato inter la revolucia movado, kies modelo estas Abdullah Öcalan, kaj la tradicia patriotismo de Suda Kurdio [6], kies prezidentecon havas Masud Barzani. Kaj la situacio povus eksplodi en la plej malbona loko, Ŝengalo [7]. La solidareco kun la jezidoj, viktimoj de genocido, disvastiĝis tra la tuta mondo. Antaŭ jaro ili sukcesis forpeli la ĝihadistojn. Sed la vilaĝoj de la regiono restas kiel antaŭe, oni eĉ ne komencis la rekonstruadon. Plejmulto el la jezidoj antaŭnelonge kuniĝis kun la movado, kiun reprezentas Öcalan kaj la PLK [8], interalie ĉar estis la partizanoj venintaj el Sirio, kiuj sukcesis haltigi la genocidon en aŭgusto de 2014, post kiam la peŝmergoj de Barzani, kiuj devis ilin defendi, estis fuĝintaj.

La memmastruma modelo de



Roĵavo pli bone adaptiĝas al la lokaj apartaĵoj ol la patriotismo de Barzani, en kiu gravas la tradicia sunaa islamo, eĉ se tiu ĉi lasta kontraŭas la ĝihadismon. Sed Ŝengalo estas en Irako, kaj Barzani ne havas administradon ekstere de sia teritorio. Bataloj inter ili jam provokis mortintojn. La ceteraj kurdoj agnoskas la jezidojn, kies simbolo estas la suno, kiel la originajn kurdojn, kiuj konservis la kredon de antaŭ la islamo, eĉ se nun ili estas minoritato. Kaj, superinte la genocidon - kvankam miloj da inoj kaj infanoj ankoraŭ restas sklavigitaj -, ili devus elpensi atingi akordon rilate Ŝengalon, post kiam ili logis la mondon favore al si, por ke la luktoj inter kurdoj ne detruu ĉion.

Notoj (Nomoj en la kurda lingvo krom la indikitaj):

[1] Newroz.

[2] “La Libereco de la Lando”.

[3] Militpredo, en la araba.

[4] Cizîr (Cizre en la turka).

[5] al-Raqqah, en la araba.

[6] Bashurê Kurdistanê, la kurda teritorio ene de la Iraka Ŝtato.

[7] Shengal.

[8] Partio de la Laboristoj de Kurdio (PLK)/Partiya Karkerên Kurdistan (PKK).

Klarigoj:

Aŭtoro: Urtzi Urrutikoetxea.

Eŭska ĵurnalo Berria, 26-an de Marto 2017-a.

Tradukis: NXC. Aprilo 2017-a.

Provlegis: AA kaj DS.

50 jarojn post la unua nuklea eksperimento fare de Francio en Polinezio

La 22an de julio 2017 en la ĵurnalo Mainiĉi aperis artikolo pri nukleaj eksperimentoj fare de Francio en Polinezio. Mi resume tradukos ĝin.

Ĉu vi scias, ke Francio faris nukleajn eksperimentojn en Polinezio en la suda Pacifika Oceano antaŭ 50 jaroj? En la atoloj Mururoa kaj Fangataufa okazis 193 nukleaj eksperimentoj ĝis 1996 kaj ankoraŭ nun problemoj de nuklea poluado ne solviĝis.

Societo 193

Ekde la jaro 1960 Francio eksperimentis atombombojn en la dezerto Sahara en Afriko, sed sendependiĝinta Alĝerio rifuzis tion, sekve Francio komencis eksperimenti en la atoloj Mururoa kaj Fangataufa en la suda Pacifika Oceano. En la 90-aj jaroj Francio ŝajne ĉesis eksperimenti, sed en 1995-96 ĝi rekomencis, pretekstante, ke mankas al ĝi sufiĉaj datumoj. Tiutempe okazis granda kontraŭbatalo, kiu evoluis eĉ en puĉon.

La memorkunsido pri tiuj eksperimentoj okazis en la urbo Papeete en la insulo Tahiti en julio. Al ĝi estis invitita s-ro Akiba Tadatoŝi. Li oficis kiel la urbestro de Hiroŝima inter 1999 kaj 2011, kaj dume li estis la reprezentanto de “Urbestroj por paco”, al kiu nun membriĝas 7439 urboj el 162 landoj. Lia agado estis alte taksita, pro kio li ricevis Premion Ramon Magsaysay (memore al la filipina prezidento Magsaysay, kiu mortis en aviadila akcidento la 17an de marto 1957), alinome Nobelpremio de Azio.

S-ro Akiba flugis al la insulo Tahiti la 27an de junio. Lin renkontis s-ino



Lena Normann, virino en siaj 40-aj jaroj, kiu apartenas al “Societo 193”. Antaŭe ŝi ne multe sciis pri la nukleaj eksperimentoj en Polinezio, sed tiun sintenon ŝanĝis la propono de tiutempa prezidento de Polinezio, ke li malkonstruu “Monumenton de la suferantoj pro la nukleaj eksperimentoj” por plimodernigi la havenon. Tiu monumento estis starigita de la grupo “Mururoa kaj ni” en 2006. Ĉirkaŭ ses metrojn kvadrato ĝi estas metitaj ŝtonoj el la atoloj Mururoa kaj Bikini, el Hiroŝima kaj Nagasaki kaj lastatempe ankaŭ el Fukuŝima, kie okazis serioza nuklea akcidento en 2011.

Tiu propono ŝanĝis eĉ “ordinarajn homojn”. Lena sentis, ke la registaro intencas forviŝi parton de la historio kaj kaŝos la problemon de la nukleaj eksperimentoj kiel tabuon. Lena kaj aliaj junuloj kolektiĝis kaj fondis “Societon 193”, memore al la 193 eksperimentoj en Polinezio fare de Francio.

Ili organizis manifestaciojn, kaj tiu

novaĵo movis la mondon, sekve komenciĝis internacie movado por kolekti subskribojn kontraŭ tiu propono. Ankaŭ en Japanio oni kolektis pli ol 30 000 subskribojn. Dank’ al tiuj movadoj la prezidento retiriĝis, nenion farinte.

La societo pli kaj pli grandiĝis kaj nun ĝi havas mil membrojn. Por sukcesigi la 50-jaran kunsidon, ĝi ripete organizis manifestaciojn, kaj vizitis 43 distriktojn en polineziaj insuloj, informante la loĝantojn pri la problemoj de la nukleaj eksperimentoj kaj kolektante iliajn voĉojn. Inter tiuj agadoj la plej grava estas realigi referendumon por postuli kompencon de Francio.

En la vilaĝa kunsido

La 28an okazis malgranda kunsido en iu vilaĝo. Kiam s-ro Akiba atingis ĝin, tie lin atendis 80 vilaĝanoj. Post



S-ro Roland

komuna spektado de filmo pri la nukleaj eksperimentoj, li parolis:

“Japanaj suferantoj pro la atombomboj agadas en tri kampoj: la unua estas publike paroli pri sia sperto, la dua estas postuli homajn rajtojn, kaj dank’ al tio ili nun rajtas ricevi senpagan kuracadon, kaj la tria estas agadi por ke aliaj homoj ne spertu saman suferon kiel ili, kaj por tio ili agadas kontraŭ nukleaj armiloj kaj nukleaj eksperimentoj. Ni, japanoj, kunlaboros por ke viaj deziroj efektiviĝu.”

Longe la loĝantoj en Polinezio estis silentaj pri suferoj pro la nukleaj eksperimentoj, ĉar ĉirkaŭ 5000 homoj laboris por la eksperimentoj, kaj ili trudite promesis, ke ili ne parolu pri siaj laboroj. En la 90aj jaroj pli kaj pli malkovriĝis poluado pro radioaktiva “morta cindro”, sekve tiuj eksaj laboristoj komencis malfermi sian buŝon.

Ankaŭ en tiu kunsido loĝantoj parolis pri siaj spertoj:

“Ni estis avertitaj, ke ni ne manĝu fiŝojn kaptitajn en Mururoa”.

“Soldatoj havis dozmetron, sed ni ne”.

“Multaj homoj june mortis pro gaso el la vertikalaj truoj fositaj por la eksperimentoj”.

“Multaj el miaj parencoj suferas pro tiroida kancero”.

Juna patro alvokis al la ĉeestantoj: “Ni postulu, ke la registaro faru esploron pri sanstato de la loĝantoj. Por movi ĝin, necesas forta movado. Ni petu de ĝi referendumon!”

Iu virino parolis: “Ni ne povas esti silentaj, ĉar tiuj eksperimentoj okazis en nia lando”.

Memorkunsido de la 2a de julio

La memorkunsido okazis la 2an de julio, kaj kolektiĝis 1000 homoj. Ĝis tiu tago “Societo 193” sukcesis kolekti subskribon el 45000 loĝantoj, nome el kvarono de la tuta loĝantaro.

La reprezentanto de “Mururoa kaj ni” s-ro Roland diris: “Antaŭ nelonge malkovriĝis, ke la insulo Hao kun 1000 loĝantoj situanta 500 kilometrojn norde de Mururoa estas poluita de plutonio. La loĝantoj postulas, ke Francio purigu la teron, sed ĝi rifuzis. Se la tero sub Eĵfel-turo estus poluita de plutonio, ĉu la registaro farus nenion?” “Ses jarojn antaŭe la franca registaro leĝigis kompensan sistemon, sed nur 2% el la petintoj estis akceptitaj. Ĝi reviziu la leĝon”.



Poste s-ro Akiba staris sur la podio kaj parolis:

“En 1973, kontraŭ la franca nuklea eksperimento, tiutempa urbestro de Hiroŝima sidostrikis kaj atombombaj suferantoj malsatstrikis”. “Ankaŭ en Japanio oni bezonis 40 jarojn da malfacila agado por leĝigi leĝaron por helpi atombombitojn”. “Unu el la celoj de nia movado estas reakiri niajn homajn rajtojn. Tiu movado baziĝas sur digno de homoj, nome justeco, tial nia movado certe venkos”.

Oni bezonos multajn jarojn por venki. Lena, kiu surportis T-ĉemizon kun la cifero 193, staris antaŭ la monumento kaj diris: “Nia devo estas informi la mondon pri la nukleaj eksperimentoj. Mi pli lernos pri Hiroŝima kaj Nagasaki”. Kie estas batalantoj, tie estas espero. Certe la situacio boniĝos. S-ro Akiba diris kun emocio: “Junaj homoj dividas siajn opiniojn kun lokaj homoj kaj ekstaras kun maljunaj homoj kaj ekleziuloj. Tio estas bona ekzemplo de la movado por homaj rajtoj”.

HORI JASUO

La 22an de julio 2017

Romano Tur-strato 4 en germana traduko

Intervjuo de Kurt Lhotzky kun la eldonistoj Jorghi Poll kaj Sarah Legler


En Septembro venis el la Viena presejo la germana traduko de la originala Esperanta romano *Tur-strato 4* de Hans Weinhengst [hans vajnhengst]. La tradukinto Christian Cimpa [kristian cimpa] informis en la retejo Libera Folio pri la verko (<http://www.liberafolio.org/2017/09/...>): “Ĝi estas romano okazanta en la laborista medio de Vieno dum la intermilita tempo, precize en 1929. La ĉefa ideo de la verko estas priskribi la senesperajn cirkonstancojn de la subaj sociaj tavoloj, al kiuj en kelkaj distriktoj apartenis la granda plimulto de la loĝantaro. Temas do pri literaturo kun politikaj implicoj, oni eĉ povus paroli pri “tendenc-literaturo”. Bonŝance la temo povas esti rigardata kiel malaktuala kaj historia, sed eĉ kun tia aliro la verko daŭre restas interesa, ebligante surprizajn renkontojn kun personoj tre mirigaj el hodiaŭa vidpunkto kaj iliaj faroj. (...) La ideon por la traduko havis Kurt Lhotzky [kurt locki], viena esperantisto. Kiel posedanto de multe vizitata librovendejo, en kies bretaroj staras ankaŭ Esperanto-libroj, li ne bezonis pensi tro fore. Kiam li foje vizitis la leg-salonon de la Viena Esperanto-muzeo, kie mi laboras, ni iom interbabilis – kun la rezulto, ke samvespere mi jam sidis ĉe bona botelo da vino super tiu fama klasikaĵo de la Esperanta literaturo por kontroli, ĉu la entrepreno realigeblas. Mia kolemino Andrea Sochurek [andrea soĥurek] tuj promesis sian subtenon, kaj kelkajn monatojn poste mi liveris la pretan manuskripton al Kurt, kiu pro siaj profesiaj kontaktoj sciis, kiujn eldonejojn valoras alparoli. Kaj li tuj sukcesis. La stabo de la eldonejo Edition Atelier senhezite kaj eĉ iom entuziasme akceptis la proponon. (...) Hodiaŭ literaturemaj fakuloj jam tre scivole atendas la aperon de Turmstraße 4, kaj tre certe ĝi meritas kaj ricevos atenton. La

nombro de la antaŭmendoj estas tre ĝojiga kaj la ĝisnunaj reagoj de la publiko al diversaj anoncoj senescepte favoraj. (...) Dum miaj ĝis nun 27 jaroj kiel deĵoranto en la Esperanto-muzeo en Vieno mi konfrontiĝis kun multaj antaŭjuĝoj kontraŭ planlingvoj kaj lingvoj entute. Mi ĝojas pri la – esperinde multnombraj – ebloj korekti aŭ almenaŭ kontraŭargumenti la plej drastajn malĝustajn imagojn pri Esperanto. Kaj tio sen blinda fervoro aŭ zelotismo, ĉar, kiel la multjara direktoro de niaj biblioteko kaj muzeo, Herbert Mayer, kutime diris: Por varbi pri Esperanto oni ne bezonas propagandi, sufiĉas rakonti pri ĝi.”

Je la 21-a de Septembro okazis en Vieno libroprezentado en Verein für Geschichte der ArbeiterInnenbewegung (asocio por la historio de la laborista movado). Estas la dua fojo – post Julio Baghy: *Hurra für nichts*, Innsbruck: Mair, 1933 –, ke en Aŭstrio renoma eldonejo aperigas libron originale verkitan en Esperanto kaj poste tradukitan en la germanan. Kurt Lhotzky faris intervjuon kun la eldonistoj Jorghi Poll kaj Sarah Legler:

Kio konvinkis renoman literaturoldonejon riski la entreprenon kaj publikigi la tradukon de apenaŭ konata romano el Esperanto?

Apud nuntempa literaturo ni havas en Edition Atelier duan fokuson: aŭstrian literaturon de la 20-a jarcento. Same kiel rilate al la samtempularo ni ĝojas, se ni malkovras nekonataĵon kaj (re)faras ĝin alirebla. La laborista literaturo – se oni povas nomi ĝin tiel ĝeneralige – estis neglektita de la burĝa literaturkritiko. Tio estas bedaŭrinda; ne nur laŭkvalite, sed ankaŭ sub la aspekto de socipolitika signifo kaŝiĝas multaj trezoroj. Precipe la viena verkisto Hans Weinhengst, de kiu neniam aperis germanlingva libro,



Christian Cimpa

ĝis Christian Cimpa tradukis *Tur-strato 4* kaj la librovendisto Kurt Lhotzky prezentis ĝin al ni. Se tiom engaĝiginta librovendisto proponas ion, memkompreneble oni rigardas tre atente kaj se la libro estas tiom grandioza, oni ne bezonas pripensi longe.

Edition Atelier multe kontribuis al la alireblo de verkintoj de la 1920-aj kaj 1930-aj jaroj: Else Feldmann, Robert Neumann, antaŭ nelonge al la brila “Marilyn” de Arthur Rundt. Kiamaniere Hans Weinhengst enviciĝas?


Multajn el tiuj ĉi verkistoj oni ne rajtas forgesi, ĉar ili ankaŭ nuntempe povas rakonti al ni nekredeblajn gravajn aferojn. Hans Weinhengst montras spirretene la situacion, se homoj restas sen helpo de la socio; tiam regis la senlaboreco kaj la malriĉeco en la Granda Depresio, kiu daŭris en Aŭstrio ĝis ĉirkaŭ 1937, kaj

kontraŭ tiu ĉi situacio ankaŭ la socialdemokratio estis grandparte senpova – hodiaŭ la novliberalismigita socialdemokratio havas grandajn problemojn kun sia propra sociala celaro, kaj la problemoj de amasa senlaboreco staras post kelkaj jaroj denove antaŭ nia pordo. Ciferecigo, tutmonda transloko de produktado kaj la teknika evoluo kaŭzas tion paŝetante, kaj la demando, kiam la krizo de kapitalismo – ni nun vivas en mallonga kaj trompa fazo de malstreĉigo – denove revenos abrupte, leviĝas preskaŭ ĉiun tagon. Silentigita estas la fakto, ke la malriĉeco en nia socio hodiaŭ troveblas inter la enmigrantaro. Kaj tie ofte estas la sama situacio, kiun Weihengst priskribas. Ni inklinas ne rigardi al tio.

La titola paĝo de “Turmstraße 4” estas treege adekvata. Kiel ĝi estiĝis?

Dankon! Mi havis la ideon de paro sur kruta ŝtuparo, poste mi devis esplori pri la vestaro en tiuj tempo kaj medio. Cetere mi ŝatas labori en miaj ilustraĵoj kun specialaj surfacoj. Ĉi tie videblas paperaj surfacoj je la muroj, kiu sugestas rompiĝemon, sed ankaŭ peras ion ŝvebant; ne paroli pri la multaj eblecoj, kion oni povas asocii kun skribado kaj papero... la malmola sinsekvo de lumo kaj ombro priskribu la kontraston de realeco kaj espero.

UWE STECHER



Monaj ĉifonoj (5)

(duonmuzikalo)

Sceno 3

Ĉiuj tri (la homo en nigro, Marta kaj ŝia filo) ektroviĝas en granda subĉiela vendejo, plejverŝajne ĝuste dum la plej vigla horo. Tie ĉi oni vendas ĉion: manĝaĵojn, teksaĵojn kaj elektronik-aĵojn.

La homo en nigro alpaŝas al unu el la vendistoj kaj metas sur lian nazon la ruĝan klaŭnan pilketo-nazon kaj iras for de la scenejo. Rekte post tio ĉiuj komercistoj por kelkaj sekundoj malaperas sub butiktabloj, sed por tuj aperi, surmetinte tiajn nazojn kaj ankaŭ plenajn klaŭnajn kostumojn. Alirinte al la budo kun la skribaĵo “Administrejo”, ili ĝentile frapas la pordon. Sed ili eĉ neĝisfine sukcesas frapi, — jen impete eliras kelkaj palaj vampiroj vestitaj per la klasikaj kostumoj kun kravato kaj veŝto.

Ĉiuj komercistoj (la vampiroj kaj la klaŭnoj) disstariĝas laŭ ŝakluda ordo tiel ke la klaŭnoj trovas sin en la unua vico, kiel peonoj, dume la vampiroj, simile al la altrangaj figuroj, majeste staras malfronte.

Forminte tian ĉenon, la “peonoj” komencas danci kankanon, fiere tenante siajn rikanajn klaŭnajn vizaĝojn, kaj la “figuroj” – balanciĝi, kiel pendoloj.

La komercistoj
(dancas kaj kantas je iu fola melodio)

Ni tute ne ferocas,
Nur monon deponas...
Negocoj ja ne nocas,
Renotu: ni bonas.

Vi kredu nin totale;
Proleto malpuras,
Martelo kaj la kapo
Inertas kaj duras.

Stultuloj vere mankas,
Aliaj laboru!
Per prezo, kiu faŭkas,
La poŝon traboru!

La poŝon traboru!

Neatendite aperas iu komercisto-vampiro sur ŝultroj portanta tolan sakon, supozeble, plenan je mono. La komercistoj-klaŭnoj, fininte sian kanzonon kaj dancon, komencas klinsaluti lin.

Komercisto kun granda monsako
(bojas voĉe, imitante iun antikvan tubon)

La poŝon traboruuu! Uuuuuu!
Uuuuuu!

Uuuuuuuuuuuuuuuuuuuuuuu!

Finfine, ne kontentiĝinte per tia efiko, li eltiras veran grandan trumpeteton kaj ekblovas ĝin. La klaŭnoj perceptas tion, kiel alvokon por ĵonglado – ĉiu el ili aperigas malgrandajn homkraniojn kaj komencas diligente ĵongli. Ĉiu klaŭno havas po tri kraniojn. Dum la komercisto kun granda monsako trumpetetas, ili ĉiusekunde pli kaj pli alte supren ĵetas la ĵonglaĵojn. Sed pro tio ke ili tro altege suprenĵetas, ili ne plu povas sukcese kapti la kraniojn. Tial la tuta planko fariĝas kovrita per kranioj. Tiam alvenas violkolora elefanto, sed ne sola. Kun ĝi aperas tri servistoj, kiuj

subtenas ĝian kontraŭproporcie
ekstreme longan rostron.

Marta

Ho, ne!
Monero plia estas via!

La servistoj

(tute senatente al la antaŭa repliko,
kantas)

Estas gaje ja vagadi,
Tuŝi rostron,
Tuŝi rostron,
Tuŝi rostron.
Sed alfronte diktatoro,
Maŝin-monstro,
Maŝin-monstro,
Maŝin-monstro...

Vi ne ŝatas demokratojn
“hipokritajn”,
“hipokritajn”,
“hipokritajn”,
De mokindaj fiaj ratoj
Vidi ritojn,
Vidi ritojn,
Vidi ritojn...

Nun ĉeestu solenaĵon
Nian gravan,
Nian gravan,
Nian gravan,
Elfekiĝon plej omaĝan
Kaj plej ravan
Kaj plej ravan
Kaj plej ravan...

La elefanto turnas sin je pugflanko
al Marta, evidente, ekvidinte en ŝi la
“diktatoron”, kaj fekas per verdaj
monbiletoj, ĝis la servistoj ne lasas
ĝian rostron. La klaŭnoj arde kaptas,
avide prenas la bankbiletojn kaj ŝovas
ilin al siaj propraj poŝoj. Marta kun la
bebo transiras al la alia flanko de la
scenejo por eskapi la tumulton.

Dume la monsako de tiu, kiu alvokis
tiun strangan elefanton, disiĝas de sia
posedanto kaj ekvivas per propra vivo.
Ĝi tremas kaj paralize moviĝas.

La monsako

(kantas)

Nutru, nutru, nutru min.
Min honoru nur!
Nun ne putru, etulin',
En hororobskur'.

Via patro, laborist',
Pagos pro loĝej'.

Restos vivi (kia risk'!)
Vi. Kaj ĉarmos plej...

Peso, jeno kaj dolar'...
Mortos vi sen ili.
Mono venas al homar'.
Devas vi jubili!

Ĉio por kaj pro la mon',
Devas vi kompreni.
Eblos reĝi en la mond',
Se liberon preni.

Preĝu, petu nur al mi;
Floros mi dumlonge...
For fervoron de l' anim'!
Ploron kaptu sponge.

La monsako rampas rekte al Marta
fone de la ne plu eltenebla hurlado de
kornoj kaj violonoj, kaj ĉiuj ĉeestantoj
(inkluzive la elefantajn servistojn, sed
ne mem la elefanton) strebas
iamaniere helpi la monsakon: jen per
puŝoj, jen per abundaj buŝaj kuraĝigoj.
Sed la virino subite tremetas kaj ĉio
silentiĝas.

Marta

(malgaje)

Monero lasta
Nun forestas.
Ŝtelistoj fiaj
Vi ja estas.

Sed...
Kial neniun vin arestas?

Sekvas neniun respondo kaj al ĉiuj
desupre falas vasta ŝtofa kovrilo kun
grandaj floraj ornamaĵoj.

Sceno 4

Marta, tenanta la infanon sur manoj,
kaj la homo en nigro troviĝas en iu
bizara hista loko, multsulka spaco, kiu
plenas je miriadoj da neklasifikeblaj
laŭaspekte skemecaj objektoj, kun la
skribaĵoj “neŭrono” kaj “glia ĉelo”
(ambaŭ kun la signoj de usona dolaro).

Marta

(indigne)

Kien nun vi altiris nin?
Mi vidas: vi senhontas.
Ĉu al de l' mond' makabra lim',
Post fin', kiu venontas?

Ĉar tro profitis vi, profet',
Senkulpan emon fidi,
De vi aspekton en komplet'
Ne plu mi povas vidi.

Homo En Nigro (persono enigma) (malice)

La cerbo bonvenigas vin
De hom', kiu eternas.
Li ne alpaŝos al la fin',
Kalkuli monon ne mallernos.

Baziĝos mondo sur la mon',
Samkiel dum jarcentoj.
Kaj baros al tiu ĉi demon'
Neniuj ŝanĝaj frapaj ventoj.

Marta

(emocie)

Valoroj viaj tre malvastaj
Impresas nur la blatojn draste
Kaj vi...

Homo En Nigro (persono enigma) (interrompante)

Mi perdas tempon, mia kara!
La ido jam atendas min.
Kaj mia fako personara
Postulas sangon en kulmin'...

La homo en nigro faras kelkajn
paŝojn kun la intenco forpreni la
bebon, sed tiumomente aŭskulteblas
iu sonoro kaj li kaj Marta, kvazaŭ helpe
de la magneta forto, disiĝas kaj
malaperas en la kontraŭaj flankoj de
la scenejo.

Sekvota venontnumero.

ESPOPORE (EVGENIJ GEORGIEV)

Eĥo ekster Esperantujo de la apero en Hispanio de esperantlingva verko

La defio vivi kaj krei vidis la lumon fine de junio 2017. La libro, eldonita de la E-grupo Liberano, de Teruelo (hispane, Teruel, nomo de aragona provinco kaj de ties ĉefurbo), kun la teknika helpo kaj morala apogo de SATeH, aperis kiel la numero 12 de la kolekto “Hispana literaturo”, aŭspiciita de HEF (Hispana Esperanto-Federacio). Temas, ĉefe, pri la esperantigo fare de mi mem de la teatra monologo *Tour de force*, de la hispanlingva dramaturgo Fernando J. López (Barcelono, 1977), kies teatraĵoj furoras, ĉefe ĉe gejunuloj.

Tial, ke la unusola persono en ĝi estas la internacie renoma kino-reĝisoro Luis Buñuel, teruelano de la vilaĝo Calanda, la LKK de la 76a HEF-Kongreso, okazinta ĝuste en la urbo Teruelo en la tagoj 23a, 24a kaj 25a de junio, antaŭvidis ĝian prezentadon kadre de omaĝo fare de la kongreso al tiu universala teruelano.


La omaĝo efektiviĝis [1]. En ĝia unua parto, mi prezentis al la kongresanaro *La defio vivi kaj krei*. En la dua parto, oni projekciis la Buñuel’an-Dalí’an surrealistman filmon *Un Chien Andalou* [Andaluza hundo] kun miaj esperantaj subtekstoj. Ĉi filmo estas historia pro la skandalo, kiun ĝi estigis dum sia premiero en Parizo en 1929, kaŭze de siaj eksterordinare aŭdacaj kaj ŝokaj bildoj. Sed la filmo estas historia ĉefe tial, ke en ĝi oni portretis la subkonscion por la unua fojo. Pro tio mi ilustris la verkon de Fernando J. López per mia esperantigo de la scenaro de tiu filmo, aperinta en la n-ro 12 de la revuo *La Révolution Surréaliste* [La surrealistma revolucio], en 1929. Dua komplemento en ĉi libro estas eseo originala en Esperanto, aŭtorita de mi mem, pri la triopo da genioj Buñuel-Lorca-Dalí kaj ties epoko.

Aldone al ĉio ĉi, kompostado bele pri-zorgita de Pedro Sanz, kovrilo kun fotoj de Tofiño, unu el la granduloj de la nuntempa hispana fotografio, kaj serio da interesaj internaj bildoj faras el ĉi eldono “veran juvelon”, laŭ la opinio de Fernando J. López, kiu, ricevinte siajn aŭtor-ekzemplerojn, mesaĝis fejsbukaĵon, kies esperantigo jenas:

“Oni tradukis verkon mian en Esperanton. Jes, en Esperanton. La verko elektita estas *Tour de force*; ĝia tradukinto, Miguel Fernández, ege nobla-kora esperanta verkisto kaj filologo kaj humanisto, kun kiu mi konatiĝis hazarde –pro unu el la hazardoj, kiujn ebligas tiu centro de kultura rezistado nomata Nova Teatro ĉe la Limo [gvidata de la majstro de dramaturgoj José Sanchis Sinisterra]–. Miguel preparis belegan eldonon de ĉi verko, ilustritan per studo liapluma pri la amikeco inter Buñuel, Lorca kaj Dalí en la Studenta Restadejo kaj per la scenaro de *Andaluza hundo*, alia el la aksoj, ĉirkaŭ kiuj revoluas mia monologo.

“Kaj, se tiu donaco ne sufiĉus, mi sciigis, ke la libron oni prezentos en ĉi monato, junio, kadre de hispana E-kongreso en Teruelo, kiel omaĝon al Buñuel, la genio, kiu inspiris al mi tiujn paĝojn.

“Fojfoje la vivo estas vere surpriza.



“Feliĉan lundon!”

Ĉi mesaĝo, en sia originala formo, eĥiĝis abunde kaj rebunde en la hispanlingva fejsbuko. Jen unu plian fojon en la lasta epoko, laboro de hispana E-verkisto estigas tre bonan bildon de nia lingvo kaj de la E-literaturo ekster Esperantujo. Mi feliĉas.

Miguel Fernández

[1] Ĝi spekteblas ĉe:

<https://youtu.be/ZJJEZE9-PU>



Anarki-sindikatoj esprimiĝas pri la situacio en Katalunio

La subskribintaj organizaĵoj, ŝtatnivelaĵoj, kundividaj la maltrankvilon koncerne la situacion en Katalunio, la subpremado fare de la Ŝtato kaj ties nunajn kaj estontajn konsekvencojn konsistantajn en perdo de rajtoj kaj liberecoj, kaj koncerne la kreskon de malnova naciismo en granda parto de la hispana Ŝtato.

Ni defendas la emancipiĝon de ĉiuj laboristoj de Katalunio kaj de la tuta mondo. Eble, en tiu kunteksto, ni ne komprenas la rajton al memdetermino sammaniere kiel la partioj kaj naciaj organizaĵoj. Laŭ ni, temas pri rajto al memmastrumado sur difinita teritorio. Komprenita ĉi-maniere, la memdetermino konsistas en kontrolo de produktado kaj konsumado fare de la gelaboristoj, rekta demokratio de la bazo ĝis la pinto, organizita laŭ la federismaj principoj. Ĝi ne konsistas en starigo de novaj landlimoj aŭ kreado de nova ŝtato.

Kiel internaciistoj, ni opinias, ke la solidareco inter la laboristoj ne devas esti limigita al la ŝtataj landlimoj. Pro tio, tute ne gravas por ni, kie ili troviĝas. Kio vere maltrankviligas nin, estas la reago en la cetero de la Ŝtato; ekzaltiĝo de malfreŝa "hispaniismo", kiu memorigas estintajn periodojn, kuraĝigitajn de la amasinformiloj, akorde kun la aŭtoritata miskonduto de la registaro. Tiu situacio estas evidenta de post la enkarcerigo de personoj, kiuj kunvokis malobeemajn agojn, aŭ la aplikado de la artikolo 155a de la Konstitucio. Ni konsciiĝas, ke tiu naciisma ekapero starigas la bazojn de estontaj limigoj de rajtoj kaj liberecoj, kontraŭ kiuj ni devas protekti nin. La fervora unuiĝo de la laŭdire "demokrataj fortoj" por pravigi la

subpremado, aŭguras malklaran horizonton por ĉiuj estontaj disidentoj. Ŝajnas, ke la post-frankisma reĝimo, kiu regas nin de antaŭ 40 jaroj, grupiĝas por garantii sian kontinuatadon.

Tiu reĝimo, kiu ekzistis kaj ekzistas en Katalunio same kiel en la cetero de la hispana Ŝtato, timas por sia propra daŭro. Amplekse kontestita kaj spertante profundan krizon de laŭleĝeco, ĝi observas, alarmita, la kreskantan nombron de malfermitaj frontoj. Krom la minaco kontraŭ la teritoria integriĝo de la Ŝtato, aldoniĝas la skandaloj pri koruptado, la perdo de prestiĝo de la monarkio, la kontestado de la drastaj aranĝoj suferitaj de la loĝantaro, la malkontenteco estigita de la sklavismo en la laboro pro la lastaj reformoj de la laboro, pri la emerita aĝo, la malaltigo de la pensioj, ktp. La senĉesaj alvokoj de la aŭtoritatoj por defendi la konstitucion, koincidas fakte kun la klopodoj plenumitaj por interrompi tiun veran krizon pri propra ekzistado, kiu maltrankviligas ilin. La danĝero estas, ke en tiu procezo la subpremaj sintenoj – kiel tiuj, kiuj okazis antaŭnelonge en pluraj katalunaj urboj – fariĝu la normo. Aŭ sintenoj eĉ pli gravaj.

Evidente, ni ne scias kien kondukos la eventoj. Ni restados atentaj pri la okazaĵoj, pretaj defendi la interesojn de la laboristoj ĉie en la Ŝtato. Ni kontraŭstaros per ĉiuj niaj fortoj la subpremado kaj la normaligon de ekstremdekstraj sintenoj, kiujn ni jam observas. Kompreneble, ni ne lasos nin manipuli de la strategioj de la politikaj partioj, kies celoj ne koincidas kun tiuj niaj. Samtempe, ni ne ĉesos

apogi la mobilizadon de la laboristaro, kiam ĝi decidis ke finfine estas momento forigi la ordonojn de la politikaj kaj ekonomiaj elitoj, kiuj de tro longe kontrolas la teritorion, nur por servadi, ekskluzive, siajn proprajn interesojn. Kiel klasaj sindikataj organizaĵoj, liberecanaj kaj luktemaj, ni estos sur la stratoj dum la mobilizadoj, kiel ni faris en multaj aliaj okazoj, kontraŭ la subpremado, la malkreskado de la rajtoj kaj liberecoj, kaj kontraŭ la koruptado.

Eble la kataluna krizo estos la fino de ia ŝtatmodelo, kiu agonias. Ke tiu ŝanĝiĝo trovos solvon en iun direkton aŭ alian, dependas de nia kapableco, kiel klaso, konduki la procezon en direkton inversan al la subpremado kaj al la kreskado de naciismoj. Ni fidu nian kapablecon akiri finan rezulton kun pli da liberecoj kaj rajtoj, kaj ne male. La veto estas grava.

Por rajtoj kaj liberecoj!

Kontraŭ la subpremado de la laboristaj klasoj!

*Confederación General del Trabajo
Confederación Nacional del Trabajo
Solidaridad Obrera*



Komento de la Liberecana Frakcio de SAT

Oni devas konstati, ke liberecanoj havas vidpunktojn tute proletajn kaj internaciemajn, kaj ke ili ne konsentas pri la ideo formi novajn ŝtatojn. Oni devus rimarki, ke la defendo de propra lingvo ne estas necese “naciisma” afero, sed oni povas ĝin konsideri ankaŭ proleta postulo. Tion dirinte, oni konstatas, ke la situacio en Katalunio, kaj virtuale en la tuta hispana ŝtato, estas sufiĉe grava. Tio eksplikas, kial tri anarki-sindikataj organizaĵoj verkis la komunikaĵon, kiun oni konigas malsupre, kaj kiun oni intencas enkonduki per tiuj ĉi linioj.

En Hispanio, fine de la frankisma diktaturo ekis la tielnomata “reĝimo de 78”, kiu enhavis kaj ankoraŭ enhavas multajn erojn de ĝi. De kelkaj jaroj, tiu reĝimo montras simptomojn de elĉerpigo. Unuflanke, la regantaj fortoj, precipe la novliberala kaj post-frankisma PP, strebis por parte rekuperi tion, kion ili komence cedis, kaj kreskigi centralismon, kaj aliaflanke la politika kataluna burĝaro strebis por pli granda malcentraligo, ambaŭkaze kadre de novliberalaj solvoj. La malakcepto renovigi la katalunan statuton fare de la hispana registaro ekigis la nunan katalunan sendependisman movadon.

Al la sendependisma bloko (ERC socialdemokrata kaj PDeCAT – antaŭe CiU – novliberala) aldoniĝis CUP. Tiu partio devenas el la tradicia sendependema maldekstro de la Kataluna Landaro (ne nur Katalunio) kaj de la nova municipa movado.

La kontraŭa bloko enhavis la PP kaj Ciudadanos, ambaŭ novliberalaj, kaj la socialdemokratan partion PSOE. La PP havas grandegajn problemojn pro koruptaĵoj kaj tio al la kataluna movado bone utilis, retroirigante la PP al malproksima ebena. La lasta evoluo de tiu situacio estas la reapero de hispana faŝisma agresema movado, kaj ankaŭ la forlaso de la sendependema movado fare de la granda kataluna burĝaro.

La sendependisma bloko ĉiam havis novliberalajn poziciojn. Tio videblas en la lastaj aprobitaj buĝetoj. Kaj tiu bloko klopodas altiri ankaŭ ĉian proletan movadon eksteran al CUP. Tiu sendependisma movado entenas kreskantan parton de la kataluna popolo. Tiu movado iĝas ankaŭ kanalo por ties ĉagreno kaj frustrado pro la socia situacio. Do tiu movado ne estas nur sendependema, sed ankaŭ kontraŭ la reĝimo de 78.

Ekde Septembro aperis la “CDR”: komitatoj por defendi unue la “r” referendumon – kaj poste la “r” espublikon. Tiuj komitatoj havas municipan karakteron. Ili multe agis kaj agas ene de tiu movado.

Ekde la fino de Oktobro la situacio akceliĝas kaj kirliĝadas: sendependec-deklaracio, elpostenigo de la kataluna registaro fare de la hispana registaro, kunvoko al katalunaj balotoj por Decembro, tuja enprizonigo de multaj katalunaj anoj de la registaro, fuĝo de parto de la kataluna registaro al Belgio, alvoko al ĝenerala striko en Katalunio...

Kiel finiĝos tiu movado, neniu scias. Ekzistas ebleco superi la reĝimon de 78, sed ankaŭ danĝero reveni al situacio de malpli da sociaj rajtoj kaj pli da centralismo favore al madridaj ekonomiaj kaj politikaj lobioj. En tiu situacio, oni povas batali kontraŭ tiu negativa perspektivo nur ekde tre solidaj kaj klaraj principoj. Neniam ajn taktiko, eĉ pravigita, povas esti tradukita al integriĝo en transversa burĝa movado.

Liberecana Frakcio

EL LA SAT-ADMINISTREJO

NOVAJ ALIĜOJ

36103	GRGUREVIĆ Ljubomir.....	HR 20036 - MOKOŠICA - DUBROVNIK.....	Kroatio
36104	TRAN Tuan Nghia.....	VN - HANOI.....	Vietnamio
36105	GARRIDO Albert Stalin.....	PH 1447 - VALENZUELA.....	Filipinoj
36106	HATACHI Toshiko.....	JP 064-0913 - SAPPORO.....	Japanio
36107*	YAOTOME Mayu.....	JP 181-0012 - TOKIO.....	Japanio
36108	KAWARA Hiro.....	JP 187-0044 - TOKIO.....	Japanio
36109	ISAENKO Udo.....	CH 5113 - HOLDERBANK.....	Svisio
36110*	OLIVEIRA-RIBEIRO Telma.....	BR 22291-170 - RIO-DE-JANEIRO.....	Brazilo
36111	SEO Junseong.....	KR - SEOUL.....	Koreio

Re-ree pri referendumo

Pro rektaj aludoj en la reproduktita letero de Dieter Rooke, mi sentas min devigata klarigi ke:

- la prikomentata dokumento ne estas kolekto de subskriboj, sed kolekto de manskribitaj nomoj kaj numeroj;
- neniam mi pridubis la aŭtentikecon de tiuj manskribitaj datenoj, tute kontraŭe, mi plencertas, ke ne temas pri falsaĵo; ĉar mi ne taksas nian kamaradon malbonintencan, mi emas pensi, ke temas pri nura miskompreno liaflanka;
- por pliaj detaloj pri ĉi afero, vidu mian koncernan artikolon en la paĝo 29 de la numero 05-06/2017.

PEDRO SANZ

Wilderswil 2017 10 11

1. Ĉiu aktiva membro rajtas sendi proponojn pri la agado de la Asocio al P.K., kiu post ekzameno decidas pri ilia publikigo en la presorgano. Principaj proponoj estu publikigitaj almenaŭ ses semajnojn antaŭ la Kongreso.
-22. Ĉiun proponon prezentatan de almenaŭ 1/10 el la membraro, la P.K. estas devigata publikigi en la presorgano.
-23. 2/10 el la membraro rajtas postuli la okazigon de referendumo pri malfido al la P.K. aŭ pri ĉiu ajn demando havanta grandan intereson por la tuta Asocio.

Estiminda Pedro Sanz, au la tuta PK el SAT,

Pri la artikolo en S-ulo publikigita de k-do Pedro Sanz - mi ege miras.

Chu li parolas en la nomo de plena PK?

Dum SAT-kongreso en Herzberg 2016 k-do Pedro Sanz montris al mi kopiojn de subskriboj, kaj suspektis ilin falsitaj. Prezidanto de PK el SAT, V. Markov promesis al mi pritrakti la deziron de multaj SAT-anoj kune kongresi kun UEA. Mi petis lin sendi al mi validan formularon por laŭstatute kaj konforme al preskribo de normoj regantaj en SAT. Tion li ne faris.

Almenaŭ en svislando estas severe kontrolata la rajto de referendumo. per civitana listo.

Chu en SAT sufichus la matrikula n-ro - au chu ankaŭ necesas la poshta adreso? Krome necesus difini periodon por kolekti subskribojn.

Tio ĉi estas en SAT apenau realisma, ĉar ne eblas kolekti subskribojn en la tuta mondo. Mi pene kolektis 137 subskribojn kaj de SAT-anoj, kaj de UEA-anoj dum UK kaj SAT kongresoj.

Certe inter ili estas 1/10 de SAT membraro.

En Gimpio estis aprobita miaj proponoj por demokratio kaj pri proksimeco de SAT kongreso kun UK.

Mia letero estas reala apliko de tiu ĉi gvidrezolucio.

Konforme al la SAT-statuto mi petas la publikigon en S-ulo.

rugh-gefrate Dieter Rooke

PS. mi kandidatiĝis por la PK

Rerereage

K-do Josef Krob (Sennaciulo n-ro 1345-1346, p. 19) reagas al mia reago kaj mi rerereagas. Lia kontribuo finas akcepteble, komencas dubinde kaj en la mezo estas argumentoj sufiĉe rebateblaj. Ja paroli pri “REALA endanĝerigo de Eŭropo okaze de ĝia islamigado” estas troigo, se oni ne montras sufiĉan pruvon. Unu afero estas ke pli kaj pli da islamanoj loĝas en Eŭropo kaj alia tre malsimila akcepti ke reale oni trudas devige islamon al tiuj kiuj ne deziras tion. La unua afero ne estas dezirinda de kelkaj, sed... kial? La dua ne estis pruvita.

En la centra argumentaro k-do Krob

parolas pri “no go zones”. Ja la uzado de la angla lingvo tiurilate montras la devenon de la misinformo. Kie estas la policaj deklaroj pri ekzistado de tiuj zonoj? Oni parolas pri perfortita virino mortpunita per ŝtonbatado pro tio (ke polico ne povis helpi, respektive malhelpi); kie tio okazis? Oni parolas pri ataki “niajn virinojn”. Ankaŭ tie la subkonscio perfidas k-don Krob. Kies estas la virinoj? Ĉu “liaj”, “iliaj”, de kiuj “ili”? Mi supozas, ke virinoj estas de virinoj mem, ke virinoj ne estas posedaĵoj.

Bedaŭrinde multaj islamanoj en diversaj landoj, devenoj aŭ tavoloj, devigas islamanojn esti vualitaj. Sed

plej ofte ili ne trudas tion al neislamaninoj. Kie okazas la malo? Onidiroj svarmas. Per onidiroj oni komencis la plej teruran genocidon de la 20a jarcento.

Mi ankaŭ bedaŭras, ke tiom da rereagoj aperu en Sennaciulo, kiam ni disponas hodiaŭ el pli taŭga platformo por diskutado, kio estas la diskutlisto per retmesaĝoj, sed ne estis mi kiu elektis tiun diskutejon. Mi preferas okaze de sekvo, iri al tiu diskutlisto kie eblas pli rapida kaj malferma interŝanĝo de opinioj.

KANI

Nekrologo

K-do Yamasaki Seikô (matr. 33873)

(naskiĝis la 21-an de novembro 1929, mortis la 10-an de oktobro 2017) estis universitata docento pri internacia komerco kaj angla lingvo, li laboris en la internacia komerco (1952-86) kaj poste pri trejnado de oficistoj en komerco. Direktoro (estranano) de Japana E-Instituto, komitatano de UEA, membro de ties lingvopolitika komisiono. Akademiano, direktoro de la Akademia komisiono pri landaj lingvoinstitutoj. Estrarano de Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo kaj de Internacia Scienca Asocio Esperantista, sekretario de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio. Fakdelegito pri ekonomio. Li aŭtoris la komparan studon La artikolo, Etimologia vortaro pragmata de Esperanto kaj la popularan kurson Enkonduko en la japanan. Li ankaŭ kontribuis al kolektivaj verkoj, inter kiuj Sindikata terminaro kaj la revizio de la Nova PIV (2002), kie li prizorgis la terminojn rilatajn al historia materiismo. Li ofte artikolis pri lingvaj kaj ekonomikaj temoj kaj prelegis en UK kaj aliaj E-aranĝoj. La Komitato de UEA elektis lin kiel honoran membron en 1999.

Li partoprenis kelkajn SAT-kongresojn kaj estis ano de la Ĝenerala Konsilantaro de SAT en la jaroj 2000.



Kompletigita surbaze de gazetara komuniko de UEA N-ro 709

2017-10-16



Dum aŭgusto 2017 mortis en la hospitalo de Gourdon (FR), en la aĝo de 95 jaroj

K-do Paul Signoret (matr. 30207)

SAT-ano ekde 1957, li estis sperta tradukisto, kiu interalie esperantigis la "Traktaĵon pri Ateologio" de Onfray (SAT-EFK 2010) kaj tekstojn pri mortopuno, reeldonitaj en 2007. Li kunreviziis la du ĉefajn tradukvortarojn eldonitajn de SAT-Amikaro, kaj kunlaboris al la reviziado de la Nova PIV (2002), ĉefe pri botaniko. Plej laste li partoprenis en lingva kontrolo de subtitoloj de filmo pri Wangari Maathai. De la fino de la 80aj jaroj ĝis 1996 li redaktis la Sennaciecan Revuon. En 1997 li kun sia edzino Ginette estis gastigantoj de Hori Jasuo kaj kuraĝigis lin libroforme eldoni siajn "Raportojn el Japanio", kiun li diligente lingve kontrolis dum 20 jaroj.

Paul kun HORI Jasuo kaj ĉerizarbo, kiun ili kune plantis.

Kompilita laŭ diversaj atestoj kolektitaj de Isabelle Jacob.

La 30an de aŭgusto 2017 mortis en Britio, en la aĝo de 93 jaroj

K-dino Marjorie Boulton (matr. 29385)

Ŝi estis plej vaste konata kiel poetino, aŭtorino de anglalingva biografio de Zamenhof kaj de la tre disvastigata legolibro "Faktoj kaj Fantazioj". SAT-anino ekde 1953, ŝi kontribuis al Sennaciulo kaj Sennacieca Revuo, notinde per profunda eseo pri "La irlanda tragedio" en la tempo de tiea civila milito. En unu el siaj teatraĵoj, "Virino ĉe la landlimo" (1959), ŝi nuancoplene traktis la temon de la jugoslava rezistado dum la dua mondmilito, inspirite de atestoj kolektitaj dum la zagreba UK (1953). Ne eblas fine prisilenti, ke ŝia amo al katoj, dokumentita en multaj poemaroj, ankaŭ igis ŝin fariĝi prezidantino de ... Kat-Amikaro.



PERANTOJ

Aŭstralio – Franciska Toubale
1 Marne Road, Mount Evelyn, Victoria 3796, Aŭstralio
rete : fran14@bigpond.net.au
Belgio – Claude Gladly
Rue du Culot, 1, BE-5630 CERFONTAINE
Tel-Fakso-Respondilo : 00-32- (0)71 644916
Rete : cglady@arcadis.be
Bankkonto : 750-6373051-18
IBAN : BE 50 750-6373051-18, BIC : AXABBE22
Bosnio-Hercegovino – Ivica Horvat
Žrtava faŝizma 1/IX, BA-71000 Sarajevo, Bosnio-Hercegovino
rete : ivica.h@hs-hkb.ba
Brazilo – Alex Sousa Santos
Via Principal, P-11, bairro Boa Vista, Green Ville
BR-45027-342 Vitória da Conquista-BA, Brazilo
rete : esperanto1000@gmail.com
tel. (poŝa) : +557 7988011780
Britio – Arturo Prent
7 Walton Gardens, Hutton, Brentwood, Essex CM13 1EJ, Britio
tel. : +44.1 .277.22.89.62
Nomo: "SAT SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA"
Bank-kodo: 09 01 56 / Kont-n-ro: 57604003
BIC: ABBYGB2LXXX, IBAN: GB62ABBY09015657604003
rete : ap_esp-sat21@yahoo.co.uk
Bulgario – Metodi Markov
Vasil Levski, 20; BG-2700 Blagoevgrad; Bulgario
tel. (fiksa) : +359 73882791 (poŝa) : +359 879040403
rete: mam1948@abv.bg
IBAN: BG98FINV915010BGN030E5; BIC: FINVBGSF
Ĉeĥio – Václav Stibůrek
J. Franka 1731, CZ-25601 Benešov, Ĉeĥio
tel.: +420.737230231, rete: stiburek.v@seznam.cz
IBAN: CZ6620100000002900048738
BIC/SWIFT: FIOBCZPPXXX
Ĉinio – BRUNO GUY CLAUDE HENRY
rete: esperanto.bhenry@yahoo.fr
Bankkonto N°6217857500009246684
SWIFT kodo/BIC: BKCHCNBJ970
BANK OF CHINA - HUNAN BRANCH N°593 1, Duan Furong
Road (M) CHANGSHA - HUNAN-ĈINIO
Francio – Barthélémy Maurau
Appartement 120, 3 allée Nathalie SARRAUTE
FR-27000 EVREUX, Francio
rete: barthelemy.maurau@free.fr
Bankkonto: 1733310 N 020
IBAN: FR82 2004 1000 0117 3331 0N02 070
BIC: PSSTFRPPPAR
Germanio – Gary Mickle
Brüsseler Str. 6, DE-13353 Berlin, Germanio
rete: gmickle@nexgo.de

KOTIZOJ 2018

Lando	Jarkotizo	Lando	Jarkotizo
Argentino	24 €	Koreio	36 €
Aŭstralio	52 €	Kroatio	16 € (120 HRK)
Aŭstrio	52 €	Kubo	4 €
Barato	8 €	Latvio	16 €
Belgio	52 €	Litovio	16 €
Bosnio-Herc.	12 €	Luksemburgio	52 €
Brazilo	20 €	Madagaskaro	4 €
Britio	52 € (40 GBP)	Makedonio	12 €
Bulgario	12 €	Malio	4 €
Ĉeĥio	24 €	Mongolio	8 €
Ĉinio	8 € (56 CNY)	Meksiko	16 €
Danio	52 €	Nederlando	52 €
Estonio	16 €	Norvegio	52 €
Finnlando	52 €	Pollando	16 €
Francio	52 €	Portugalia	28 €
Germanio	52 €	Rumanio	12 €
Grekio	8 €	Rusio	16 €
Haitio	4 €	Serbio	12 €
Hispanio	40 €	Slovakio	16 €
Hungario	16 €	Slovenio	16 €
Irano	12 €	Svedio	52 €
Islando	36 €	Svisio	52 € (64 CHF)
Israelo	36 €	Tajvano	32 € (1160 TWD)
Italio	48 €	Turkio	16 € (52 TRY)
Japanio	52 € (6960 JPY)	Ukrainio	8 €
Kanado	52 € (80 CAD)	Usono	52 € (64 USD)
Kolombio	12 €		

DUMVIVA MEMBRECO: 1 300 €

Hispanio – Pedro Maria Sanz Sanz
Apartado 8042, ES-28080 Madrid
rete : pedrosanzsat@gmail.com
Konto: 0182-9465-65-0200272726 (BBVA)
IBAN: ES48 0182 9465 6502 0027 2726
BIC: BBVAESMM
Hungario – Tóth Zsolt
Agyag u. 10, HU-9400 Sopron, Hungario
Tel: +36-20-5188919, rete: zstoth75@gmail.com
Bankkonto: 11773377-00000354
IBAN: HU55 1177 3377 0000 0354 0000 0000
BIC: OTPVHUHB
Italio – Carlo Bourlot
Via Quarello 40, IT-10135 Torino (TO), Italio
rete : carlo.bourlot@gmail.com
Tel. : 011-39.70.477, Poŝtel.: (+39) 327-327 3993
Poŝtkonto : n-ro 43976158
Kodo IBAN : IT88Z0760101000000043976158,
Kodo BIC : BPPIIRXXXX
Izraelio – Jehoŝua Tilleman
97-A Dereh-Akko, IL-26373 Kirjat-Mockin, Izraelio
rete : b48705544@013.net
Japanio – Nakamura Daiŝin
Shinagawaku Yashio 5-6-39-1006, JP-140-0003 Tokyo
rete: sat-peranto-japana@googlegroups.com
Poŝtkonto: 00980-9-37624 SAT-Nihon
Katalunlingvio
Viktore Solé – KEA, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell,
Hispanio
tel.: +34 93 716 36 33, rete: v.sole@esperanto.cat
Koreio – Jung Hyunsoo (Paz)
Gwanggyo-hosu-Ro 356 No.301 (3F), Suji-Gu
KR-448-130 Yongin-Si, Gyeonggi-do
rete : paze23@gmail.com
Kroatio – Ivica Šćepanović (Truto)-poŝte
Otok Brac, HR-21414 Gornj Humac, Kroatio
Tel: +385.21.647.059, Poŝtel: +385.098.182.79.07
rete: ivica.scepanovic1@st.t-com.hr
Poŝtkonto: 3200129804 Splitska banka
IBAN: HR81 2330 0033 2001 2980 4, BIC: SOGEHR22
Litovio – Gražina Opulskienė
Obuoliuko 42, LT89213 Mažeikiai, Litovio
Tel: +37068736457, rete: grazopul@yahoo.com
Bankkonto: LT347300010001720030
BIC/SWIFT kodo: HABALT22, Swedbank
Malagasio – Justine (Lala) Lalalarisoa
Lot IIC - 72 - FD Manjakaray, MG-101
Antananarivo, Malagasio
rete : llespr@libero.it
IBAN: MG46 0000 4000 0800 7694 2010 112
BIC: BMOIMGMG
Norvegio – Cécile Anda
Esperantoveien, LI, NO-4320 Hommersak, Norvegio
Portugalia – Manuel Luis Pedrosa Alves
Estrada Principal, 79, Morelino, PT-2710 Sintra, Portugalio
rete: morelinho_sintra@hotmail.com
Rusio – Nikolao Gudskov
a/k 57, RU-105318 Moskvo, Rusio
rete : nikolao@orc.ru
Serbio
Miomirka Kovačević, Španskih Boraca 32/2, RS-11070 Novi
Beograd, Serbio
rete: miomirka.kovacevic@gmail.com
IBAN: RS35160003020011349313
SWIFT/BIC: DBDBRSBG
Svedio – Inga Johanson
Stampgatan 60B-1202, SE-411 01 Gotenburgo, Svedio
rete: ishim@hotmail.com aŭ ingajohansson50@gmail.com
Poŝtkonto: Svenska arbetesperantoförbundet, n-ro 5 31 60-8
IBAN: SE75 9500 0099 6026 0053 1608
BIC: NDEASESS
Svisio – Richard Schneller
Rue Charles-Knapp 20, CH-2000 Neuchâtel, Svisio
rete : rischneller@gmail.com, Poŝtkonto n-ro 25-158577-1
Tajvano – CHO Chaoming
12F2, No. 41, Bijhong Street, TW-80342 Kaohsiung
rete : cmcho@so-net.net.tw
Ukrainio – Andreo JANKOVSKIJ
str. Lajosha Havro 11-B, ap. 68, UA-04211 KIJV, Ukrainio
rete : classs@bigmir.net, telephone : 380 67 99 470 03
Aliaj landoj
SAT-Sidejo, 67 av. Gambetta, FR - 75020 Paris, Francio
rete (ĝenerala retadreso): kontakto@satesperanto.org
rete (pri financaĵoj): financoj@satesperanto.org
Tel: (+33) 09 53 50 99 58
Poŝtkonto: 1234 22 K, La Banque Postale, Paris
IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
eblas pagi ankaŭ al la konto de SAT ĉe UEA: satx-s
aŭ al la konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org

Sennaciulo
Oficiala organo de SAT

Asocia sidejo de SAT
67 avenue Gambetta,
FR-75020 Paris, Francio
Retadreso: kontakto@satesperanto.org
Retejo: http://satesperanto.org
Tel: (+33) 09 53 50 99 58
Poŝtkonto:
SAT n°1234-22 K, Paris
IBAN: FR41 2004 1 000 01 01 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA: satx-s
Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org
Plenum-Komitato de SAT

Prezidanto: Vinko Markovo
Sekretario: Diana Riŝar
Kasisto: Bruno Henry
Membroj: Guy Cavalier, Franjo Martin, Pedro Sanz,
Dominiko Simeone

Sennaciulo
Redaktoskipa kunordiganto: Vinko Markovo
Enpagaiganto: Nicolas Raymond
Ceteraj redaktantoj: Djémil Kessous, Gary Mickle, Grazina
Opulskienė, José Maria Salguero (Kani), Richard Schneller, Serĝo
Sir' kaj Franciska Toubale.
Kontribuojn sendu elektronike al:
sennaciulo.redaktejo@gmail.com
aŭ paperpoŝte al
SAT-Amikaro: 132-134 boulevard Vincent Auriol,
FR-75013 Paris, Francio
Pri financaj aferoj sendu al:
financoj@satesperanto.org
Libromendojn sendu al:
libroserveo@sat-amikaro.org
Librajn eldonproponojn sendu al:
pimskrabo@yahoo.fr
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendadas.
Imprimé par/Presita de:
TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.
Aperas dumonate - Bimestriel.
Directeur de la publication: Guy Cavalier
Abonnement annuel/jara abono:
France 39 €
Autres pays/aliaj landoj: peti la tarifon de nia peranto aŭ de la
SAT-centro.
Dépot légal à la date de parution:
N° CPPAP 05 20 G 86567

- > Por la nemenciitaj landoj la ĉi-jara baza kotizo al SAT estas 4 €.
- > La PK indikos la prezon de la postaj jarkotizoj laŭ la geografia zono de la lando.
- > **Nura abono al Sennaciulo : 75% de la kotiz-prezo en la koncerna lando.** Pagante ĉi sumon, nemembro povas jaraboni Sennaciulon + ĝian jaran suplementon Sennacieca Revuo.
- > Aktiva membro pagas la plenan jarkotizon. Li/ŝi ricevas, perrete kaj surpapere, Sennaciulon + ĝian jaran suplementon Sennacieca Revuo.
- > Help- kaj grupmembroj pagas minimume duoblon de la plena jarkotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.
- > Malriĉaj emeritoj, kiuj ne povas pagi plenan jarkotizon, senlaboruloj kaj junuloj (ĝis 25-jaraj) pagas minimume la duonon de la plena jarkotizo, kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.
- > Samfamiliano de membro pagas la duonon de la jarkotizo. Li/ŝi ĝuas la samajn rajtojn (ekzemple dum kongreso) sed ne ricevas la asocian organon nek la SAT-Adresaron.

DONACINTOJ

Solidarkaso
LYNN Ronald _____ 48,00 EUR
CUENOT Roland _____ 28,00 EUR
XIONG Linping _____ 4,74 EUR
VOHLA Franck _____ 10,00 EUR

Helpfonduso kongreso

Aukcio SAT-Kongreso Seulo_ 150,00 EUR
MARKOVO Vito _____ 200,00 EUR
BERNARD _____ 8,00 EUR



Turisma programo de la 91a SAT-kongreso en Kragujevac

OKK de la 91-a kongreso de SAT kunlabore kun la Turisma Organizo de Kragujevac planas kelkajn promen- kaj bus-ekskursojn duontagajn kaj tuttagajn tra Kragujevac kaj al proksimaj lokoj en centra Serbio (la regiono Ŝumadija kaj valo de la rivero Morava). Promen-ekskursoj tra la kongresurbo gvidos al la loko de ekesto de Kragujevac, laŭ la pontoj super Lepenica, tra malnovaj urbopartoj, apud la unua relvojo en Kragujevac kaj videbligos la unuan metilernejon, la komplekson de Arme-teknika instituto, "La girlandon de Miloš" t.e. lokon de iama kortego de duko Miloš Obrenović (Miloš Obrenoviĉ), Malnovan preĝejon, Malnovan Parlamentejon, Restadejon de duko Mihailo Obrenović, la unuajn en Serbio Gimnazon kaj Teatron, kaj aliajn arkitekture interesajn kaj historie gravajn konstruaĵojn el la 19-a jarcento, kiam interkruciĝis restaĵoj de turk-balkana arkitekturo, tradicia popola konstruarto kaj modernaj arkitekturaj influoj el Eŭropo. Estos vizititaj ankaŭ Monumento al pereintaj Ŝumadianoj, Granda parko kaj Memorparko Ŝumarice (Ŝumarice) omaĝa al naziaj viktimoj el la Dua mondmilito.

Eksterurbaj busekskursoj gvidos al perloj de mezepokaj preĝejoj arkitekturo kaj mura pentroarto de Serbio, inter kiuj elstaras la monakejo Manasija el la 15-a jarcento, la plej brila verko de la



El la kaverno de Resava



Frandaĵoj de serba kuirarto

Morava Skolo de la mezepoka serba konstruisto. En ĝi funkciis la fama manskriba metiejo "Skolo de Resava", fonto de transskriboj de verkoj kaj tradukoj kiuj riĉigis la serban kulturon. Pli novtempa, el la dua jardeko de la pasinta jarcento, estas la kvinkupola preĝejo-maŭzoleo de la dinastio Kradordević (Karaĝorĝević) konstruita en bizanca stilo sur la monto Oplenac en urbeto Topola. Ĝi estas siaspeca antologio de mezepoka serba fresko-arto kun mozaikaj kopioj de 725 freskoj el 60 serbaj monakejoj kaj preĝejoj. La mozaikoj konsistas el 40 milionoj da kubetoj en 15.000 nuancoj. En luksa kriptotroviĝas tomboj de 25 apartenantoj de la dinastio.

Inter la vizitotaj naturaj belaĵoj elstaras la Kaverno de Resava aĝa 80 milionojn da jaroj kaj akvofalo "Veliki Buk" ("Granda Bruo"), ambaŭ proksime de la monakejo Manasija, vizitotaj dum la sama ekskurso. La Kaverno de Resava konsistas el pluraj haloj, koridoroj kaj kanaloj ornamitaj per mirindaj stalagmitoj kaj stalaktitoj, galerioj, kolonoj, gutoŝtonaj kurtenoj kaj ŝtoniĝintaj akvofaloj.

La ekskursaj tagmanĝoj estos aranĝitaj en etnostilaj restoracioj aŭ vilaĝa etnotradicia familidomo kun tipa menuo de serba gastronomio. Vingustumado en reĝaj vinkeloj de Topola ankaŭ estas planita. Kiel kutime, unu kongresa tago estos plene ekskursita tago, sed iuj ekskursoj estos ripetitaj ankaŭ en aliaj tagoj dum la semajno.

RADOJICA PETROVIĆ, EL LA KONGRESA OKK



La kongresejo - hotelo Kragujevac



Vilaĝa turismo - kamparana domo en Serbio



Oplenac - mozaikoj en la kriptot

Kandidatoj por la Ĝenerala konsilantaro de SAT



Dekmil(Choi Man-won) (34140):

En la jaro 1965, mi naskiĝis en la malgranda urbeto Nampyeong, najbare de Gŭangju, Sudkoreio, kie nun mi loĝas. En licea periodo mi spertis la 5-18-popolleviĝon, kiu okazis en la urbo Gŭangju la 18-an de majo 1980, kontraŭ tiama aŭtokrata registaro.

Pro la influo de la 5-18-popolleviĝo, mi tre nature studis politikon en universitato kaj studis Historion de la Ĉina Komunista Partio en Ĉinio. Dum mia studado en Ĉinio mi sciigis pri SAT kaj membriĝis al SAT.

Post reveno al Sudkoreio, ĝis nun mi instruas pri la ĉina politiko en kelkaj universitatoj kiel docento kaj eble 2~3 jarojn post mia reveno al Sudkoreio, mi organizis SAT-grupon en Sudkoreio kaj la unuajn kelkajn jarojn servis kiel SAT-peranto de Sudkoreio.

Mi tradukis la libron "La danĝera lingvo" de Ulrich Lins en korean lingvon en 2013.



MIYAZAWA Naoto (33356):

Naskiĝis en 1955.

Aliĝis al la Demokrata Junulara Ligo por Japana Komunista Partio en gimnazio.

Estis estro de lernanto-organizo dum 6 monatoj en gimnazio.

Provis organizi Esperanto-klubon en la gimnazio, sed malsukcesis pro malalta nivelo de mia Esperanto-kapablo.

Eksiĝis el la Demokrata Junulara Ligo kaj aliĝis al la Komunista Junulara Ligo por la 4-a Internacio en la kolegio en Fukuŝimo.

Dum 10 jaroj, post la eksiĝo de la Komunista Junulara Ligo, restis kiel nesektano por la 4-a Internacio, poste fariĝis anarkiisto.

Movadis subteni la korean movadon por demokratio.

Post la reveno al Sapporo, organizis junulojn kontraŭ loka atomcentralo.

Dum la batalo kontraŭ la atomcentralo, estis arestita kun junuloj.

Post malvenko de la batalo, vizitis San-Franciskon por lerni Esperanton kaj anglan lingvon.

Lernis Esperanton en la Somera Kurso de San-Franciska Ŝtata Universitato kelkfoje.

Dum restado en Usono, kelkfoje vizitis Meksikon, kaj batalis per malsatstrikto kontraŭ japana kompanio pro maljusta trakto de laboristaro.

Estis arestita en la manifestacio kontraŭ perforto de policanoj en San-Francisko.

En 2008, organizis batalon kontraŭ la pinta konferenco G8 en Hokkajdo, kun koreaj kamaradoj.

Instruis Esperanton al junuloj kaj organizis junajn esperantistojn anarkiistajn.

Partoprenis en SAT-Kongreso (Seulo/Gimpo) unuafoje.

Estas elpanto de SAT-peranto de Japanio.

Nikolao Gudskov (33491):


Naskiĝis en 1953, esperantisto ekde 1982, SAT-membro ekde 1989.

D-ro pri biologio. Laboris kiel scienca laboranto pri fiziologio de plantoj kaj historio de biologio, poste – en neregistaraj organizoj pri defendo de homaj rajtoj; dum kelkaj jaroj profesie okupiĝis pri Esperanto kiel instruisto kaj redaktoro de gazetoj. Aŭtoro de pluraj artikoloj en E-gazetaro kaj de kelkaj libroj en la rusa pri Esperanto kaj en Esperanto pri diversaj temoj (biologio, filozofio, Eo-kulturo k.a.). Laŭ politika orientiĝo – anarkiisto. Membro de Akademio de Esperanto (elektoperiodo 2016-2024).



Gary Mickle (35083):

Naskita en 1951 en Usono, kie mi lernis Esperanton en 1967, de 1973 vivanta en Berlino (Germanio), emeritiĝinta en 2017, eksa laboristo, SAT-ano de 1995. Miaj ĉefaj agadkampoj en SAT estas la redakcia skipo de S-ulo, SAT-EFK, Poresperanta Fakto, Sennaciista Frakcio, Vegetara Sekcio.



Amparado Cisnero Rovira (35950):



Amparado Cisnero Rovira, naskiĝis 1948 en Buey Arriba, Bayamo, antaŭe provinco Oriente. Post 1959, kiam la Kuba Revolucio venkis la diktaturon de Fulgencio Batista, mi aliĝis al la idearo de la nova socia evento kaj vigle partoprenis ĉiujn aktivajojn. Post kelke da jaroj mi komencis lerni en la elementa lernejo por atingi la sesan klason. Post tio mi iris en pedagogian lernejon kaj fariĝis instruisto de la elementa edukado. En la jaro 1968 mi komencis lerni en la pedagogia instituto "José Martí", kie mi atingis la diplomon de instruisto de la angla en la jaro 1979. Antaŭ la triumfo de la Revolucio mi laboris kiel ŝuciristo, agrokulturisto kaj kiel faranto de etaj taskoj kun la celo gajni salajreton por helpi la familian ekonomion, ĉar mi estis la ununura vira subtenanto de tiu familio (avino, onklino, fratino kaj mi). Post mia diplomiĝo kiel instruisto, mi laboradis en diversaj edukinstitucioj, de la mezlernejo ĝis la universitato. En la jaro 1984 mi lernis Esperanton kaj de tiam mi estas partopreninta plurajn eventojn naciajn kaj internaciajn. Mi neniam aliĝis politikan partion, tamen mi kunlaboris por la evoluigo de la Revolucio per mia agado. Nuntempe mi estas emerito, sed mi ankoraŭ laboras.



Pollando rezistas, p. 7



Originala projekto en Grekio: Ĥora, p. 12



Eĥo ekster Esperantujo de la apero en Hispanio de esperantlingva verko, p. 23



Tamen, Noruzo, p. 15



50 jarojn post la unua nuklea eksperimento fare de Francio en Polinezio, p. 18